

1977 julio – aŭgusto

70-a jaro

n-ro 859-60 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

# esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)  
nieuwe binnenweg 176 — nl-3015 bj rotterdam — nederlando



90 jaroj de la Internacia Lingvo



## Vi trovos

festa la pli grandan parton de la enhavo de ĉi tiu numero. Kiam ni antaŭ iom da tempo decidiĝis omaĝi la 90-jaran jubileo de la Unua Libro, ni konceptis ĝin ĝuste kiel feston de la Libro, de la lingvo, ne de Zamenhof mem aŭ de la Movado. Tamen, kiel tio bele evidentiĝas en la tekstoj de ĉi tiu numero, mal-facilas aparte trakti unu el tiuj tri temoj, sen tuŝi la aliajn du. Prof. Waringhien, dojeno de la esperantologoj, fake aprezas "la patinon de la tempo", kiun la Zamenhofa lingvo akiris tra la naŭ jardekoj, kaj – ĝuste taksante sian nun-an rolon de primaso – li alvokas "elteni". Peter Forster analizas la kialojn de nia lingva unueco, sed Claude Piron, kies reaktiviĝon ni devas ĝoje saluti, avertas nin pri danĝeroj al kiuj kondukus la neologisma imitemo. Ulrich Lins per sia teksto plonĝas en la historion kaj klopodas streĉi kelkajn teoriajn kaj ideologiajn fadenojn. N.Z. Maimon prezentas sian novan "elfosajon" el la movada praepoko. Sed, se ĉiuj ĉi kontribuajoj parolas en tia aŭ jena maniero pri la lingvo, du longaj versaj tekstoj estas la lingvo mem "90 jarojn poste. . .". La poemo "1887" respondas al la ofta lastatempa demando: kio okazas kun Marjorie? Nu, okazas io bela kaj ĝojiga – ŝi verkas eĉ pli bone ol antaŭe! La ĵongla kaj verva kontribuajo de William Auld defie ĵetas verso-lancojn al la establiĝinta ekstera mondo. Ni eble diru, ke la dediĉa linio de tiu poemo ŝovis ĝin "nur" al la sesa paĝo, kaj ĝi preskaŭ instigis la redaktoron lasi, ke la poeto pravu en la 21a verso de la poemo.

## Enhavo

- 121 1887 – 1977: La 90-jara jubileo de la Internacia Lingvo: Naŭdek jarojn poste. . . (Gaston Waringhien)
- 122 1887 (poemo de Marjorie Boulton)
- 123 La lingva aŭtoritato de Zamenhof (Peter G. Forster)
- 125 La okcidenta dialekto (Claude Piron)
- 126 Letero okaze de la 90-jara jubileo de Esperanto (poemo de William Auld)
- 127 Ĝusta difino – erara konkludo; Kiel Kautsky antaŭ naŭdek jaroj imagis la vojon al internacia lingvo (Ulrich Lins)
- 130 Nahum Slouŝc – la forgesita pioniro (N.Z. Maimon)
- \*\*\*\*\*
- 132 Recenzoj ("La ĥimeroj", "Kvindek argentiaj folkloraj kanzonoj" k.a., "Mastro de Kôrboja")
- 133 Laste aperis. . . (novaj eldonajoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 134 La 29a Kongreso de IFEF: Mankis loko por ĉiuj (Gernot Ritterspach)
- 135 La Unua Internacia Lernejo: Ni praktikas Eŭropon (Stefan MacGill), Elektaj por la Komitato de UEA: Kvin novaj komitatanoj B
- 136 Kalendaro de Esperanto-aranĝoj ĝis la fino de 1977
- 137 Nekrologoj: Cesare Arieti, Kolomano Kovaĉ, Adamo Lacalendola, Juan de Oyarzabal, Anna Riis, Yöngsiyebu Rinĉen, Lakshmiswar Sinha, Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 139 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Anoncetoj
- 140 Esperanto en radio (kompleta tabelo)

## La kovrilo

Parto de la Biblioteko Hector Hodler en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo: Inter la libroj – LA LIBRO, la Unua Libro de Zamenhof el 1887. Al tiu eta broŝuro, apartenanta al la plej maldikaj kajeroj en la Biblioteko, ĉiuj aliaj dekmiloj da volumoj sur la biblioteka bretaro ŝuldas sian ekziston kaj siajn riĉon, prestiĝon, diversecon kaj nomon eĉ. Jen kial ĝi estas kaj longe restos LA LIBRO DE LA LIBROJ.

## esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,- gld.) Unuopa ekzemplero 3,- gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,- gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

## Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de UEA-agado: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Beethovenlaan 6, Doorwerth 6865 EA, Nederlando; tel. (085) 33 56 31.



Gaston WARINGHIEN:

# Naŭdek jarojn poste...

ĈAR NE ESTAS PROBABLE, ke mi ĝisvivos la cent-jaran datrevenon de Esperanto, almenaŭ la naŭdekjaran mi salutu per kelkaj vortoj.


Se, je la finiĝo de miaj sesdek jaroj da esperantisteco, mi ĵetas rigardon al la pasintaĵoj, tuj saltas al mi en la okulojn du konstatoj: la viv-obstino de nia movado kaj la malrapideco de ĝiaj progresoj.

La viv-obstinon atestas unue, ke ĝi supervivas plej gravajn katastrofojn, internan (la Ido-krizon) kaj precipe eksterajn: du mondmilitojn kaj sisteman persekutadon en pluraj landoj, i.a. en la du ĉefaj, en kiuj ĝi komence ekfloradis. Tiun vivoforton atestas, due, rimarkindaj antaŭenpaŝoj: senprecedente kreskis la literaturo, aŭ traduka (plena traduko de la monumentoj de la diversaj grandaj religioj: la Biblio, la Korano, la Bagavadgito, la Granda Lernado de Konfucio ktp; esperantigo de la ĉefaj verkoj de Dante, Cervantes, Shakespeare, Mickiewicz, Heine, Baudelaire, Petöfi, Ibsen, Lusin, Sartre, por nomi nur la plej famajn) aŭ originala (ĉu necese citi la nomojn?) aŭ teknika (mi aparte menciuj la gravajn terminarojn: la *Internacia komerca-ekonomia vortaro* de F. Munniksma, la *Elementoj de geologio* de Cailleux-Gérard, la *Sporta lingvo en Esperanto* de T. Ujlaky-Nagy ktp); la propagando alprenis pli efikajn metodojn: post la fiasko de 1923 antaŭ la iama Ligo de Nacioj, la starigo de "Konsultaj Rilatoj" inter Unesko kaj UEA aperas kiel unua etapo al la definitiva oficialiĝo; la kreado de pluraj katedroj pri Esperanto en kelkaj universitatoj pruvas, ke al nia lingvo ne estas nepenetrebla la instruistaro ktp. Sed ĉiuj tiaj atingoj restas ankoraŭ apenaŭ konataj de la granda publiko; la amas-mediaj komunikiloj kuŝas ankoraŭ ekster nia atingopovo; la individua varbado, kun siaj mankoj kaj hazardoj, restas nia ĉefa rimedo de

disvastigado, kaj UEA ankoraŭ plu-sopiras pri tiu dek-mila aktiva membro, kiun ĝi ĉesas jam de jardekoj.

De tiu malrapideco de la progresado ekzistas pluraj kaŭzoj; pri la politikaj kaj ekonomikaj mi ne parolos, ĉar pri tio mi ne kompetentas; sed pri la psikologiaj mi memorigos kelkajn nociojn. Nia plej granda malamiko estas la inercio, kaj estus infanece miri pri tio: en la homa historio, laŭ la frapa formulo de E. Labrousse, post la ekonomika malfruas la sociala, kaj post la sociala malfruas la mensa. Ĉiu novaĵo, kiu postulas spiritan penadon ĉe la amasoj, enkondukiĝis kun nekredebla prokrasto, kia ajn estis ĝia racia pravigo. Mi aliloke citis la aferon de la reformo gregoria de la kristana kalendaro: ĝi postulis simple kvar jarcentojn, por esti oficiale akceptita de la grandaj ŝtatoj; similajn barojn renkontis la decimala sistemo – kaj ankoraŭ nun renkontas, ĉar almenaŭ pri la geometrio kaj la horaroj ni konservis la sesdekuman sistemon de la antikvaj Sumeranoj. Nu, la lingvo estas io ankoraŭ pli enradikiĝinta en la kolektiva menso, ol la kalendaro aŭ la mezurunuoj; la lingvon ni suĉas kune kun la patrina lakto, en ĝin deponiĝas niaj plej fruaj perceptoj, ĝi donas formon al nia komenca mondrigardo. Tio ornamas la lingvon per tia mistika prestiĝo, ke ĝi faras el ĝi la simbolon kaj la gardilon de la homgrupoj, kiuj ĝin uzas. De post la falo de la Romia Imperio, mi ne konas nacion, kiel ajn mizera aŭ disvenkita ĝi estas, kiu konsentis fari sia la lingvon de la najbaro aŭ venkinto.

En tiaj cirkonstancoj nenio mirinda, se la publiko, ne nur la popolamaso, sed ankaŭ kaj eĉ pli la klerularo, rifuzis longatempe kredi je la ebleco de "artefarita" lingvo, kiu havus neniajn radikojn en la spirita heredaĵo de unu gento kaj ne kunkreskis kun ĝi; kaj kiam Esperanto pruvis sin vivanta kaj akiris ĉiujn karakterojn de






la "naturaj" lingvoj, ili plu rifuzis rekoni ĝian rajton al ekzistado. Efektive, malgraŭ maloftaj honorindaj esceptoj, inter la literaturistoj, sciencistoj, gazetistoj, parlamentanoj kaj registaroj regas la pli-malpli konscia sento, ke ne nur apogi, sed eĉ serioze konsideri Esperanton estus neinde je sia memrespekto kaj danĝere por sia kariero. Prave oni povas, kun Claude Piron, paroli pri ĝi kiel pri "la tabuita lingvo".

Kian perspektivon tiu stato de la aferoj lasas al ni, esperantistoj? Certe ne senesperigan: mi ne tiel maleslimas la homaron, ke mi opinius ĝin nekapabla je spirita progreso; sed longevidan, jes; nur post multe, tre multe da jaroj trafos ni la sukceson, ĉar ni devas lasi al la kolektiva menso la tempon alkutimiĝi al tiu rutin-atenca novaĵo. Post kelkaj jarcentoj, kiam la valoro de la Esperantaj verkoj, originalaj aŭ tradukitaj, estos konvinkinta la eldonistojn kaj la legantaron, ke utile estas scipovi ankaŭ tiun lingvon; kiam la partoprenantoj de la internaciaj renkontiĝoj finfine agnoskos, ke pli oportune estas paroli rekte en Esperanto ol riski la hazardojn de la simultana tradukado; kiam iliaj buĝetoj ne plu povos sufiĉi al la kostoj de la sesobla, naŭobla aŭ dekduobla publikigado de la samaj dokumentoj; tiam nia lingvo, akirinte la patinon de la tempo, aperos al ili kiel provebla rimedo, ĝi estos respektata kaj iom post iom praktikata tra la mondo.

Ĝis tiu tre malproksima epoko, ni havas la devon konservi vivanta kaj agpreta tiun Esperanton, en kies nomo kuŝas la sekreto de ĝia forto. Ni devas **elteni**: tio signifas, rilate al la ekstera mondo, senlace proponi ĝin, diskonigi ĝin al ĉiuj, kiuj povas tiri profiton el ĝia uzado, neniam preterlasi la varbadon: humila, ofte sendanka penado — sed, fosante la sulkon, kiel ajn malmola estas la grundo, paŝon post paŝo oni ĉiam povas fari. Rilate al ni, tio signifas ne kontentiĝi je la dek-



**D-ro L.L. Zamenhof: Post 90 jaroj, lia ĉefverko ankoraŭ nur survojas al la kulmino de sia aktualeco.**

lecionaj lernolibroj, sed serioze aplikiĝi je ĝia studado; ne ĉesi plibonigi nian scipovon de tiu admirinda ilo de komunikado; tio signifas fine gardi la unuecon de la lingvo, nepre necesan al ĝia fina venko, unuecon, kiu povas efektiviĝi nur sur la sola bazo de la Fundamenta kaj de la Zamenhofa lingvouzado. Je tiaj kondiĉoj — kaj mi estas konvinkita, ke la granda plimulto el la esperantistoj konsentas pri ili — mi firme kredas, ke ni aŭ niaj nepoj — ĉu gravas? — fine atingos tiun celon, kiun la Majstro difinis antaŭ 90 jaroj, kaj de kiu niaj rigardoj povu neniam deflankiĝi!

**G. Waringhien,**  
prezidanto de la Akademio

**Marjorie BOULTON:**

# 1887

Tra la latitudaj cirkloj alternadis nigro, oro;  
Febraj kuŝis la vunditoj; arestitoj, en angoro;  
Ĉiu timoplana centro estis ies mia koro.

Afganio: kie triboj batis sin en maltrankvilo,  
Pluraj fremdaj registaroj enmiksigis pro utilo.  
Intrigantoj murdis ĉefon, kaj komplicis lia filo.

Franca venĝo! Sango, fero! Sangofero aŭ perejo!  
Bismarck trompe trumpetadis, venkis per veiga veo,  
Krude trudis al germanoj pligrandigon de l'armeo.

Olivarboj; sun' hispana kaj kolomboj en la kortoj;  
Kaj sescent kanonoj; ve, kaj malsufiĉas niaj fortoj;  
Fondu ni fabrikon propran por la iloj de la mortoj.

Olivarboj kaj oranĝoj; katedraloj kaj mantiloj;  
Duonmiliono ne sufiĉis da fusiloj;  
Premi la vinberojn ruĝajn; ne sufiĉas mortigiloj.

Kretaj turkoj kaj kristanoj vundis unu la alian,  
Sango sur la strat' atestis ĉies pravcertecon pian;  
Minareto kaj Madono aŭdis ĝemon agonian;

Dum virinoj krete palaj kaŝis sin en kela kaŭro,  
En la cerbaj labirintoj, en la postminoa daŭro,  
Pensoforme, oferiĝe, reestiĝis Minotaŭro.

Grandpotencoj la bulgarojn en bataltapetojn teksis.  
Kermadekan Insularon Nov-Zelando jam aneksis.  
Lorenanoj per francemo la germanojn, **ach!** perpleksis.



Peter G. FORSTER:

# La lingva aŭtoritato de Zamenhof

NENIU povas devigi perforte, ke ĉiuj esperantistoj akceptu unu solan fundamenton por la lingvo. Pro tio povas ekzisti nur **aŭtoritato**: tio estas potenco, kiun la "regatoj" akceptas kiel laŭrajtan. Kaj, kun rimarkinda facileco, la esperantistoj agnoskas la aŭtoritaton de la *Fundamento*, kiun akceptigis Zamenhof en la Unua Universala Kongreso en Boulogne. Ĉar la akcepto de la Zamenhofa *Fundamento* estas la kerno de la kunteniĝo de la esperantistaro, necesas konsideri la manieron, en kiu ĝi akceptiĝis. Estas utile kompari ankaŭ la sukcesan kunteniĝon de la Esperanto-movado kun la malpli sukcesa kunteniĝo de aliaj proponoj por internacia lingvo. Ĉi tie mi ne intencas nur priskribi la jam bone konatajn eventojn de la Unua Universala Kongreso kaj la akcepton tie de la *Deklaracio*. Prefere mi analizos la principojn de kunteniĝo de la esperantista parolkomunumo. La unuaj proponoj por internacia lingvo rilatis filozofiajn lingvojn: la plej bone konataj el ili estas tiuj de Dalgarno kaj Wilkins. Sed tiuj skemoj dependis por sia valideco de la akcepto de la filozofiaj sistemoj de la koncernaj aŭtoroj. La konata malavantaĝo de aprioraj skemoj tiuspecaj estas, ke ilia sekvantaro fariĝos nur tiuj, kiuj estas disĉiploj de la koncerna filozofo. Krome, estas notinda afero, ke Leibniz agnoskis la malfacilaĵojn

de la aprioraj filozofiaj lingvoj, el kiuj la unuan li mem proponis. Poste li preferis provizore skizi aposterioran simpligon de la latina lingvo. Sed, eĉ tiam li intencis, ke la lingvo celu unuavice la filozofojn. Kaj, jen unu serioza malfacilaĵo. Ne ekzistas nur unu objekte eltrovita simpligo de la latina. Ekzistas diversaj eblecoj, fakto kiu evidentiĝas en la diversaj nuntempaj proponoj por novlatina skemo. Do restas la problemo, kiujn simpligojn oni faru? Tio estas aparte grava, se oni unuavice celas filozofojn, aŭ eĉ klerulojn kaj intelektulojn ĝenerale. Ĉiu, kiu konas akademian institucion, konstato, ke iliaj membroj estas homoj, kiuj ne facile konsentos unu kun la alia. Ili eble povas konsenti pri la dezirindeco de simpligo de la latina, sed baldaŭ komencos disputi pri la proponotaj detaloj.

Ja estas notinda afero, ke Esperanto ne unue celis la klerulojn. Ĝi unue trovis siajn adeptojn ekster akademian rondon. Eĉ en la nuntempo, la konsisto de la Movado estas sufiĉe vasta, kaj tute ne necesas esti universitata por gvidi la Movadon. Samtempe la Movado neniam estis kontraŭklerula, kaj ĉiam bonvenigis tiujn, kiuj estis pretaj akcepti la disciplinon de la *Fundamento*. Kaj, Esperanto ne estis kreaĵo de profesia lingvisto. Zamenhof havis nur bonan **praktikan** kapablon pri diversaj lingvoj. Li konis la tri ĉefajn lingvojn de sia regiono: la rusan, la polan kaj la germanan. Li bone legis ankaŭ la francan, la tiutempan internacian lingvon, kaj studis diversajn aliajn. Zamenhof estis okulisto, kies profesio apenaŭ rilatis al liaj lingvaj streboj. Li faris sintezon surbaze de sia bona **praktika** lingvoscio, kaj ne interesis sin pri aprioraj principoj. Kontraŭe, li multe eksperimentis pri praktika verkado en la nova lingvo, antaŭ ol li eldonis ĝin. Li ne pretendis, ke la skemo estas absolute perfekta, kaj unue bonvenigis proponojn por ŝanĝo. Tamen, li baldaŭ fariĝis konservema rilate la

Parton de Kamerunio britoj cedis al germanoj;  
Taŭgis tia malavaro al politikistaj planoj;  
Sur la lando donacita loĝis multaj afrikanoj.

Viktoria, jubilea, ormonera, bronz-statua,  
Nun ekregis Zululandon, imperiis larĝinflua.  
Leĝa ruĝo sur la mapo. Maltrankvila kor' Zulua.

Imperia konscienco celis ian helpon, ŝirmon,  
Murdaj bandoj de birmanoj frontis ordigeman firmon:  
Sed la rabobandoj daŭre plagis rabopredan Birmon.

Lastvenintaj usonanoj prezidanton ĵus rajtigis  
Anstataŭi tribajn leĝojn, kiuj indianojn ligis.  
Triba tradicio restis: indianoj ja stoikis.

Malsatantoj en Irlando pagis luksojn en Londono;  
Intendantoj elloĝigis familiojn laŭ ordono;  
Mizeruloj ploris tage; nokton rompis kraka sono.

Lunlumuloj pafmortigis kaj mutilis, brulatencis;  
Mensogad' remensogigis ĝis nenio klare sencis;  
Fia venĝ', revenĝo fia, karusele konsekvencis.

Ĉinoj ĉinon ekzekutis: kristaniĝe tiu krimis;  
Dum kristanoj en Vieno Kriston judan pli estimis:  
Per petskribo kontraŭjuda sian kredon ĵus esprimis.

*Ho, sola kor' de judo kompatema,  
Koro malforta, peza pro dolor'!  
Nun preta por ekpaŝo timotrema,  
Ho, sola kor'!*

En Novjork' dokistoj strikis, brute batis novdungitojn;  
Policanaj klaboroj brute kvietigis la ekscitojn;  
Fruntojn jen laboro rompis, kapitalo, okcipitojn.

En Liono anarkistoj bombis la Justicpalacon;  
Juston kaj liberon kriis, donis sangon kaj frakason;  
Kaj bombuloj en Vieno planis vundodisdonacon.

Kaj strikantoj en Belgujo uzis pulvon, dinamiton;  
Maljusteco maljustigis, amarigis klasdividon;  
Rajtojn homoj hurlis lupe, senrajtigis kripligiton.

Komplotantoj kontraŭcaraj siajn kuglojn nun venenis.  
Eksplodilojn multmortigajn pro principoj ili prenis.  
Suferejoj siberiaj al la caro apartenis.




strukturon de la lingvo, kaj neniam vere entuziasmiĝis pri radikalaĵa ŝanĝo. Li akcentis la gravecon de la es-  
 tablo de literatura tradicio por vivi la lingvon. Oni  
 prave atentigas pri la modestecon kaj maldiktoron de  
 Zamenhof. Sed kiam temas pri lingvaj aferoj, li estis  
 preta uzi la forton de sia aŭtoritato por malkuragi  
 ŝanĝon. La kreo, unue de la literaturo, poste de la ko-  
 munumo de parolantoj de Esperanto, estis konseverma  
 forto kaj ankaŭ evoluis afekcia ligo inter la espe-  
 rantistoj kaj la jam ekzistanta lingva strukturo.  
 La adeptoj de Esperanto plejparte apogis ĝian prak-  
 tikan valoron kaj tradicion, kaj ne interesis sin pri ab-  
 straktaĵoj, kiel "absoluta perfekteco" (ĉar, kio efektive  
 estas tio?). Ĉiam por la plibonigistoj restis la sama  
 problemo: kiujn plibonigojn oni faru? Notinda estas  
 la skisemo ĉe la plibonigistoj: Ido naskas siajn pro-  
 prajn idojn. Kiam temas pri normoj de "absoluta per-  
 fekto", oni ne povas argumenti kontraŭ la nuna  
 strukturo de Esperanto el tiu vidpunkto, ĉar Esperanto  
 ne akceptas tiujn normojn. Kompreneble, ne sekvas el  
 tio, ke Esperanto estus sukcesinta, se oni ne estus  
 atentinta pri perfekteco. Ankaŭ la volapuka movado  
 apogis sin sur la principo de aŭtoritato, sed, ĉar ĝia  
 skemo enhavis multajn evidentajn malperfektaĵojn, ĝi  
 rapide perdis sekvanaron. Kvanke ekzistas malkon-  
 sento inter la diversaj projektoj, necesas memori ke  
 ekzistas ankaŭ konsento. En la aposteriora grupo, kiu  
 ne sekvis rekte de la latina, evidentiĝis ekzisto de  
 "familia simileco" (kiel rimarkis Otto Jespersen). Sed,  
 kiel Waringhien indikas<sup>1</sup>, la perfekteco estas pli kom-  
 plika afero. Li mem listigas diversajn kriteriojn por  
 ĵugi internacian lingvon: ili rilatas al aferoj de sim-

1 G. Waringhien, "Esperanto antaŭ la tribunalo", *Lingvo kaj vivo*, p. 363-386 (385-386). La Laguna: J. Régulo, 1959.

Laŭktime edziniĝis infaninon patro hinda;  
 Nun kleretan junulinon rajtis edzo tre malinda;  
 Sekvis precedenca kazo; sed justico estas blinda.  
 Rajtojn kriis edzo bruta, rauke pro tuberkulozo.  
 Veis la ĵuĝisto mem, sed ne troviĝis sava klaŭzo.  
 Devis li devigi sin al vivodaŭra nigra nauzo.  
 Daŭojn sur la Ruĝa Maro oni kaptis, prienketis.  
 La sudana sklav-vendisto en arbustojn fuĝe ĵetis.  
 Lastan predon kontuzitan; kaj si kor-rompige etis.  
 Mi plej gravas! Nur mi pravas! Rajton! Regnon! Al atak!  
 Civitanoj! Civilizu! Bombobruo! Vipoklak!  
 Fi aliaj! Ni kaj niaj! Bojo, bleko, kriko, krak!

*Sub la palmoj, for de l' mondo,  
 Sur insulo Pacifika,  
 Apud varma, vasta ondo,  
 La princino Likelike  
 Faste mortis sinofere*

La Lingva Komitato (parto), kiun prezidis d-ro Zamenhof.



2 "La vojo nia", *Lingvo kaj vivo* (jam citita), p. 357-362 (359).  
 3 *Lingvo kaj vivo*, p. 360.

Car en Esperanto oni apelacias al la praktikaj kaj la  
 tradicio, necesas akcepti la konsekvencojn de tiu prin-  
 cipo. Pro ĝi, grava devo de la Akademio estas ekzegezo  
 de la Zamenhofa tradicio. Tiu Zamenhof mem komen-  
 cis en siaj *Lingvaj respondoj*. Iuj unuopaj esperantistoj  
 eĉ faris konkordancojn de diversaj verkoj de Zamen-  
 hof. Kiam okazas disputoj pri la lingvo, oni apelacias  
 al la Zamenhofa aŭtoritato. Tiu aŭtoritato daŭre havas  
 gravan rolon en la kunteŝigo de la Esperanto-movado.  
 Waringhien rimarkas, ke "Ni tute ne asertas, ke Espe-  
 ranto estas la sola ebla solvo, nek la plej perfekta solvo:  
 ni simple asertas, ke ĝi estas solvo, solvo sufiĉe elpro-  
 vita, por ke oni estu certa pri ĝia taŭgeco".<sup>2</sup>  
 Li prave atentigas pri la necesa sekvo de tio: "Ĉe la  
 piedoj de la Majstro, la budhista devizo ĉiu vera  
 Esperantisto devus havi en la koro kaj en la spirito".<sup>3</sup>

Peter G. Forster

*Por paigi la diinon  
 Kiu el vulkan' kolere  
 Jam minacis fajran finon.  
 Likelike la naiva  
 Velkis vane en espero  
 Supersticia, primitiva.  
 Kvietigis la kratero;  
 Regfratin' pro gento sia  
 Mortis en simpleco sankta,  
 En obeo neracia  
 Al la devo ordonanta!*

*Blanka sablo pure brilis  
 Sub ondara ŝaŭmojflustro;  
 Du manetoj nun trankvilis  
 Velkaj sur la velka brusto.  
 Likelike lunolune  
 Kusis sub la plumaj palmoj,  
 Incensite florfume  
 Inter maropludaĵ psalmoj.*



# La okcidenta dialekto

PRISKRIBANTE la strukturon de Esperanto, Zamenhof foje diris: "Simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj" (*Fundamenta krestomatio*, 11a eld., Parizo: Esperantista Centra Librejo, 1927, p.248). Efektive, se, stile kaj sintakse, Esperanto estas slava, kaj, vortare, latina-ĝermana, estas fakto, ke ĝia maniero signi la gramatikan funkcion de ĉiu frazero similigas ĝin al kelkaj aglutinaj lingvoj, kaj ke la perfekta neŝanĝeblo de ĝiaj vorteroj troviĝas nur en la t.n. izolaj lingvoj, al kiuj apartenas, ekzemple, la ĉina. Strukturo, ĝi do estas nefleksia, nehindeŭropa lingvo.

Nefleksiaj lingvoj uzas relative longajn kunmetaĵojn, formitajn el mallongaj eroj. Vortoj kiel **estrarkunsido**, **nerenovigebla**, **remalsaniĝi** estas tipaj tiurilate: kvin- aŭ ses-silabaj, ili konsistas nur el unusilabaj eroj. Kontraste, la fleksiaj lingvoj, ĉefe la latinidaj, malŝatas longajn kunmetaĵojn, dum longaj radikoj ilin ne ĝenas. Vortoj kiel **konversacio** aŭ **simultana** estas tipaj pri latineca formiĝo.

Zamenhof intence elektis sian vortkonstruon, kiun li nomis "dismembrigo de la ideoj", kun la celo fari lingvon plej facile lerneblan kaj uzeblan por ĉiu, kiaj ajn la socia medio kaj la lingvo gepatra. Vorto kiel **memstara** estas tuj komprenebla por ĉino kun baza lingvoscio (oni diras ĉine *zili* aŭ *duli*, el *zi* aŭ *du*, "mem", kaj *li*, "star"), sed **aŭtonoma** ne. Ĉino

komence komprenas ĉi-lastan kiel "rilata al la nomoj de aŭtomobiloj", poste provas diveni la sencon el la kunteksto, kaj eventuale devas serĉi en vortaro.

Japana esperantisto triageracia, s-ro Kjotaro Deguĉi, kiu perfekte mastras la ĉiutagan lingvon, foje rakontis, kiel li ne povis kompreni du prelegojn de ISU, kiujn li ĉeestis, pro la abundo de nekonataj vortoj: "Mi baraktis kun vortaroj . . . , sed ne eblis sufiĉe rapide, kaj mi sentis min pli ol iom deprimita." (*My travels in Esperanto-land*, Kameoka: Oomoto, 1973, p.74).

Miaopinie, multaj esperantistoj nun uzas okcident-eŭropan dialekton de latente vere tutmonda lingvo. Al okcidentanoj tiu aserto sendube ŝajnos fantaziega. Sed kiel do ili reagus antaŭ jena teksto?:

Dum la filo faris tonŝian interpretadon en la Vejjuanhuejo por Interbua Peiheo, kie la nova vejŝenga guejdzeo diskutiĝis, la patron oni veturigis al la ĉenŝia jijuano, kaj la jiŝengo diagnozis sinĝi-gensajon.

Ĉu skandale? Se jes, estas same skandale uzi la sekvan-tan lingvaĵon:

Dum la filo faris similtanan interpretadon en la Buroo por Interministeria Koordinado, kie la nova sanitara reglamento diskutiĝis, la patron oni veturigis al la municipa hospitalo, kaj la medicinisto diagnozis infark-ton de la miokardio.

Ĉino, koreano aŭ japano, kiu, neniam lerninte eŭropan lingvon, studis Esperanton dum du aŭ tri jaroj, ne pli komprenos ĝin ol okcidentano la antaŭe prezentitan. Kelkaj unuopaj orientanoj – intelekta eliteto – uzas multajn similajn "okcidentaĵojn", sed ne tiudirekte esprimiĝas la kolektiva volo: ĝi petas uzon de pli simpla lingvo. En tutmonda Esperanto, la koncerna frazo, iom pli mallonga (7 silabojn), tekstos:

Dum la filo faris samtempan interpretadon en la Oficejo por Interministreja Kunordigo, kie la nova

Ne pro sinofer' perfekta ĉesis monta erupcio,  
Ne pro paganin' sub palmoj en morala idilio.  
Kanonestroj ridetemus pro la manko de racio.

En ĵurnalo la insulo rajtis etan alineon.  
Kolonaroj tagposttage tamtamadis venĝoveon  
Kiam Bismarck vekis timojn, pligrandigis la armeon.

El maturaj metropoloj homoj volis civilizi;  
Tiu estis scioreĉaj, povis gvidi, organizi;  
Krei ŝtatajn kruelejojn, mensogante mobilizi.

Meze de fieraj falsoj, kredotrudoj kaj obskuro,  
Ĉiu universitato estu blanka lumoturo:  
Jen veremoj: humanismo kaj scienco, artoj, juro.

Sed studentoj ululantaj silentigis profesoron  
En Vieno, subtenintan sian propran registaron  
Kiu kontraŭ lingvo ĉeĥa ĵus forprenis leĝan baron.

Pereuoj, malvivuoj, pensufoka bruo tondra,  
En la jura fakultato maljustigo senkonfronta,  
Laŭtis en latino, iam civiliza lingvo monda.

Kraĉoj al la polaj judoj; regimentoj al landlimoj;  
Imperioj; klaskonfliktoj; krueligaj gentaj timoj;  
Kaj cenzuroj; kaj torturoj; fireĝimoj kaj viktimoj.

*En sonĝo princinon mi vidis...*

Civilizitaj psikoj sub surfaco  
Vulkane kovas ardon de malpaco;  
Restas sulfuro, lafo, la minaco

Pri flama fluo de la erupcio.  
Ĉe juda okulist' en Varsovio  
Al sinofer' plusiĝis nun racio.

Libreto kvardekpaĝa ĵus aperis.  
Ĝi ne furoris tuj, sed ĝi sinceris,  
Verketo de doktoro, kiu esperis.

**Marjorie Boulton**

**Noto:** La diversaj ekzemplaj okazintaĵoj de la unua duono de 1887 troviĝas en la londona *Times* por 1887, kiun mi studis en la Bodleja Biblioteko en Oksfordo. M.B.



prisana (aŭ: publiksaneca) regularo diskutiĝis, la patron oni veturigis al la urba malsanulejo, kaj la kura-cisto diagnozis kormuskolan (tubo)ŝtopon.

Tiu estonta lingvo grandskale uzos metaforajn esprimojn; ekzemple, -ejo signos institucion, ne nur lokon, kio ebligos uzi **ministrejo**, **oficejo**, **sekretariejo** en la senco de la nundialektaj **ministerio**, **buroo**, **sekretariato**. Simila uzo de metaforoj estas universala kaj ne kaŭzas ĝenon. Neniu franclingva botanikisto aŭ inĝeni-ero iam ajn grumblis, ke la esprimoj *pomme de terre* ("terpomo") aŭ *chemin de fer* ("fervojo") kreas miskomprenojn pro konfuzo kun "veraj" pomoj aŭ vojoj. Jen citaĵo montranta, kiel nehejme kelkaj okcidentanoj sentas sin en lingvo kun alitipa strukturo:

"Ĉu lingve kaj stile frazo kiel 'La turpa oldulino softe apertis la pordon al sia kelo kaj lante descendis la ŝtuparon' ne impresas pli riĉe, pli vivece sed antaŭ ĉio pli nature, ol 'La malbela maljunulino mallaŭte malfermis la pordon al sia kelo kaj malrapide malsupreniris la ŝtuparon'?"

(*Heroldo de Esperanto*, 1974.01.16, p.4)

La unua frazo estas en tiel nenatura okcidenta dialekto, ke mi, okcidentano, kiu lernis Esperanton infanaĝe, ne komprenis ĝin tuj. Sed la dua ne estas pli bona: ĝi ŝajnas verkita de fremdulo. En tutmonda Esperanto, oni dirus ekzemple:

'La malbela grandaĝulino kviete malfermis la pordon alkelan kaj trankvilpaŝe desupris ' laŭstupare'.

Ĉiu koncepto povus esprimiĝi ankaŭ alivorte. Ekzemple, anstataŭ "kviete" (softe, mallaŭte), oni povus diri: **apenaŭ aŭdeble**, **zorga(nte) ne brui**, **kun minimuma bruo**, **plej silente**, ktp.

Persono, kiu ĉiam esprimis sin per la plursilabaj kunmetaĵoj de lingvo nefleksia, instinkte sentas, ke ilia senco ne rezultas el nura sumo de la unuopaj signifoj, sed esprimas novan koncepton: por li **vagonaro** ne estas "aro da vagonoj" kaj **eltrovi** signifas ion alian ol "trovi el".

La granda avantaĝo de tiu sistemo estas, ke ĝi malplej ŝarĝas la memoron. Kiam mi kelktempe restis sen kontakto kun la ĉina medicina lingvo, mi forgesis, kiel ĉine diriĝas "malario" kaj "holero", sed ne "flava febro" nek "infarkto de la miokardio". Kial? Simple ĉar la vortoj *nüe* ("malario") kaj *huoluan* ("holero") asociiĝis kun nenio miamense, dum *huangre* kaj *xinji-gengsai* konsistas el ordinarlingvaj eroj: *huang* = "flava", *re* = "febroy", *huangre* = "flava febro"; *xin* = "koro", *ji* = "muskolo", *xinji* = "kormuskolo", "miokardio", *gengsai* = "pasej-ŝtopo", *xinji-gengsai* = "kormuskola tuboŝtopo", "infarkto de la miokardio". Kio okazas al okcidentano pri orienta lingvo, tio okazas al orientano pri Esperanto. Ĉu vere nur tiuj, kiuj lernis lingvon, en kiu ili retrovis eĉ ne unu elementon el la propra, kapablas konscii, kian taskon prezentas la asimilo de sufiĉa vortprovizo en la lingvo **komplete fremda**?

1 En Svislando, kie oni ofte skias kaj ekskursas en la montaro, nature kreiĝis la vortoj **alsupri** ("supreniri"), **desupri**, **alvali** ("malsupreniri"). Tiuj ne estas pli longaj ol **ascendi** kaj **descendi**, sed multe pli konformas al la profunda strukturo de la lingvo.

En la ĉina, vortoj kiel **trajno**, **lifto**, **demokratio**, ktp, estas kunmetaĵoj obeantaj la principon, kiun Zamenhof nomis "dismembrigo de la ideoj", tiel ke neokcidentano pli facile lernas la ĉinan vortprovizon de la ĉiutaga vivo ol la Esperantan. Ĉu tiu fakto ne estas pripensiga? Kompreneble, tio ne signifas, ke vortoj kiel **trajno** aŭ **hospitalo**, profunde radikantaj en la lingvo, ne meritas lokon apud **vagonaro** kaj **malsanulejo**. Simile, vortoj kiel **fajna** kaj **engaĝi** tradukas konceptojn necesajn en la hodiaŭa internacia vivo, kiujn alie esprimi estus tre komplike.

Sed la uzantoj de okcidentaĵoj kiel **aŭtostopi** ("petveturi"), **ekspliko** ("klarigo"), **replike** ("rebate"), **ascendi** ("supreniri", "alsupri"), **simultana** ("samtempa"), **ekskuzi** ("senkulpigi") kaj multaj aliaj, kiuj havas tradiciajn vortigojn konformajn al la kerna lingvokonstruo, devus konscii, ke ili sin esprimas dialekte, kaj ke ju pli multaj tiaj vortoj iĝos, des pli kreskos la lingva distanco inter la latinnutritaj kaj la ceteraj esperantistoj.

Kelkaj personoj laŭdire bezonas la okcidentan dialekton por havi stilon esprimriĉan, kun forta elvoka povo. Ili fakte ne fidus la riĉecon de la Esperantogrundo, kies latentaj estas grandegaj por esprimiĝo plej arta (sed kiujn pritrakti postulus alian artikolon).

Se eblas uzi "tutmondan Esperanton", kial ne provi? Finfine, temas nur pri memdisciplino, kiu signifas komprenon, respekton kaj pli demokratian sintenon rilate al la neokcidentanoj. Verdire, ankaŭ al la socie malfavoritoj en la mondo nelatina. Kion la vorto **aŭtostopo** alportas al nigra usona laboristo, en kies lingvo oni diras *hitch-hiking*? Se Esperanto ne estu elita lingvo, etne kaj socie, necesos trovi la arton "dismembrigi la ideojn" kaj ilin taŭge kunmeti.

Claude Piron

William AULD:

## Letero okaze de la 90-jara jubileo de Esperanto

al Simo Milojević

Saluton, Simo! Volas mi esprimi,  
Okaze de l'nunjara jubileo,  
Mian defion; volas mi, jes, primi  
Kun mia spado el la portepo,  
Prete partion pluan; volas rimi  
(Sen pliaj tropoj) iom pri l'Ideo  
Por kiu ni laboras, kaj probable,  
Ke fine alceliĝos nia krablo.  
Ne timu, tamen! Ne vin mi alfrontas  
Kiel Davido antaŭ la giganto!



Ulrich LINS:

# Ĝusta difino — erara konkludo

KIEL KAUTSKY, ANTAŬ NAŬDEK JAROJ,  
IMAGIS LA VOJON AL INTERNACIA LINGVO

”JU PLI INTENSIGAS la internacia komunikiĝo, des pli sentiĝas ankaŭ la bezono de internacia komunikaĵo, de universala lingvo.”<sup>1</sup> Tion skribis antaŭ naŭdek jaroj la german-aŭstra marksisto Karl Kautsky (1854-1938), kiu tiutempe komencis akiri renomon kiel gvida teoriisto de la tutmonda socialisma movado.

La koincido estas frapa: Kautsky atentigis pri la bezono de internacia lingvo en 1887, la naskiĝjaro de Esperanto. Laŭ mia scio, tiun paralelecon ĝis nun ne notis la esperantlingva literaturo.<sup>2</sup> Konvenas do iom pli atente ekzameni la starpunkton de Kautsky.

1 K. Kautsky, ”Die moderne Nationalität” (La moderna nacieco). *Die Neue Zeit* (La nova tempo), vol. 5, 1887, p.392-405, 442-451 (citaĵoj p.448). — Ekstraktoj el tiu ĉi artikolo kaj el tiu de 1908 (vidu noton 3) estas, en franca traduko, konsulteblaj en: Georges Haupt k.a., *Les marxistes et la question nationale, 1848-1914. Etudes et textes* (La marksistoj kaj la nacia demando... Studoj kaj tekstoj). Paris 1974, p.114-142.

2 Ankaŭ ne rimarkita de E. Lanti, *Manifesto de la sennaciistoj*. 2a eld. Paris 1951, p.15-16. Pri la koincido ja atentigis (kun nesufiĉa klarigo) Horace B. Davis, *Nationalism and Socialism. Marxist and Labor Theories of Nationalism to 1917* (Naciismo kaj socialismo. Marksismaj kaj laboristaj teorioj pri naciismo ĝis 1917). New York, London 1967, p.141.

La citita frazo troviĝas en ampleksa studo de Kautsky pri la moderna nacieco, aperinta en *Die Neue Zeit* (La nova tempo), grava teoria organo de la socialdemokratio, kiun Kautsky fondis en 1883 kaj redaktis ĝis 1917. En sia artikolo li firme deklaras, ke kun la evoluo de la ekonomio falos la muroj inter la nacioj; la bezono de universala lingvo li nomas ”simptomo de la bezono por unuiĝo de la nacioj de la moderna civilizacio en unusola ekonomia teritorio, por malkonstruo de la naciaj bariloj”.

## Internacia lingvo kiel bezono de la epoko

La teoriista kalibro de Kautsky mankis al lia samtempulo Zamenhof. Sed ankaŭ tiu opiniis, ke la epoko de la finiĝanta 19a jarcento bezonas internacian lingvon. Pri la solvo proponita de Zamenhof Kautsky ne povis jam scii, kiam li verkis sian artikolon, kaj fakte li imagis la vojon al universala lingvo tute alimaniere, ol la varsovia okulisto. Menciante Volapük, la antaŭulon de Esperanto, Kautsky atribuas al tia nova, ”arbitre kreita” lingvo dubindan valoron: ”Volapük apenaŭ transiros la rangon de sekreta lingvo por kelkaj malmultaj sciintoj.” Li profetas daŭran malmultiĝon de la lingvoj bezonataj por internacia komunikado kaj, male al Zamenhof, antaŭvidas la universaligiĝon de unu el la ekzistantaj, grandaj naciaj lingvoj. Ni citu iom pli detale:

”Por esti ’klara’, por povi plene partopreni en la moderna ekonomia kaj intelekta vivo, oni jam nun devas kompreni, laŭeble ankaŭ paroli, apud sia gepatra lingvo minimume ankoraŭ unu duan lingvon, unu mondlingvon. Tiu ĉi neceso ĉiam pli kreskos; apud la mondlingvoj la naciaj lingvoj malaltiĝos al rango simila al tiu, kiun nuntempe okupas la dialektoj apud la skriba lingvo. La naciaj lingvoj estos pli kaj pli rezervataj al hejma uzo kaj ankaŭ tie ĉiam pli alprenos la rolon de malnova familia meblo, kiun oni konservas

Atakos mi la lokojn, kie fontas  
La fuŝkonceptoj kontraŭ Esperanto;  
Ĉar sciu: pri la lingvo mi nek hontas,  
Nek kredas, ke ĝi estas forvelkanto;  
Kaj tio min subtenas dum baraktoj,  
Ke, dum debat’, al ni ne mankas faktoj.  
Kial do ĝuste vin mi alskribaĉas?  
— Diable, vi ja estas redaktoro!  
Do se letero jena al vi plaĉas  
Vi eble eternigos min en gloro:  
Pri publikigo la poet’ ne kraĉas,  
Ĉar kiu emas kanti sub ignoro? —  
Precipe se la kanto celas hardi,  
Instigi, kuraĝigi, kaj standardi.  
Jam naŭdek jarojn Esperanto kreskis:  
Sprosis, burĝonis, kaj ekfloris vive.  
Ĉu l’ ras’ infana dume adoleskis?  
Ni devas, ve, respondi negative.  
La registaroj pompe sin UNESKis  
Por paca kunlabor’ — sed efektive

Montriĝas: ESK signifas nur ”ŝajniga”,  
Kaj UNuecon baras stulto diga.  
Stulto? Ĉu troa vort’? Sed ĉu ne stulte  
Ke fremdajn lingvojn oni ĉiulande  
Instruas, tamen gajnas nur malmulte  
Laŭ proporcio inter ocean’ de  
L’elspezoj kaj la flako finrezulte?  
Plimulto kuŝas anhelanta strande!  
Sincere ni agnosku: ĉi debito  
Celadas nur kreadon de elito  
Kapabla regi ... lingvojn, kaj do homojn:  
Ne mankas mono ĝuste por tradukoj,  
Interpretistoj pelas for fantomojn  
El tur’ babelaj per l’altprezaj trukoj,  
Kaj, se ni kredas niajn ekonomojn  
— Ĉar tiaj ili estas (aŭ verukoj!) —  
Solviĝas tiel, kvazaŭ sen problemoj,  
La tuta ĝeno de la lingvopremoj.  
Kaj tamen oni provas komputile  
Forviŝi spurojn de l’Babel’ biblia:



kun pietato, sed kiu ne plu havas grandan praktikan valoron. Ĉiam pli disvastiĝos la scio de la lingvoj, parolataj en la grandaj centroj de monda komuniĝo, en Londono, Novjorko, Parizo, Berlino, kaj inter tiuj siavice unu venkos super la aliaj. Kiu lingvo estos tiu, oni kompreneble apenaŭ povas hodiaŭ diri; sed ĉiuokaze estos kaŭzoj ekonomiaj, kiuj venkigos ĝin, ne iuj konsideroj pri gramatiko aŭ muzikeco.”


Precipe la pli malgrandaj nacioj sentas, daŭrigas Kautsky, la bezonon uzi komunan lingvon, ekz. la germanan aŭ francan, kaj estas malavantaĝe, se tiun evoluon malhelpas nacia respektemo.

### Diferenciĝo aŭ asimiliĝo?

La opinion diritan en 1887 Kautsky konservis ankoraŭ multajn jarojn poste. En alia, pli konata artikolo li skribis en 1908, ke en socialisma socio la homoj sci-povos krom siaj naciaj lingvoj unu aŭ plurajn mondlingvojn:” . . . tiam ekzistos ankaŭ la bazo por la iom-post-ioma malgraviĝo kaj plena malapero unue de la lingvoj de pli malgrandaj nacioj, por la fina kunigo de la tuta kultura homaro en unu lingvo kaj unu nacieco...”<sup>3</sup> Kaj en 1917 li ripetis: ”Ne la diferenciĝo, sed la asimiliĝo de la naciecoj ... estas la celo de la socialisma evoluo.” Kautsky akcentis, ke la amasproduktado postulas ne la konservon de multlingveco, sed la lingvan unuigon de la homaro: ”Kontraŭagi al ĝi estas reakcie.”<sup>4</sup> Kautsky estis ĝis 1914 la plej aŭtoritata teoriisto de la socialista Dua Internacio; liaj verkoj, precipe tiuj pri la problemoj de nacieco kaj internacieco, havis

3 K. Kautsky, ”Nationalität und Internationalität” (Nacieco kaj internacieco). *Die Neue Zeit*, vol. 26, 1908, *Ergänzungsheft* (Suplemento), n-ro 1, p.1-36 (citaĵo p.17).

4 Karl Kautsky, *Die Befreiung der Nationen* (La liberigo de la nacioj). 4a eld. Stuttgart 1918, p.47, 51.



### Kautsky kaj Zamenhof: Teorio kaj praktiko.

grandan influon je la monda laborista movado.<sup>5</sup> Kvankam Lenin en 1918 polemikis kontraŭ la ”renegato” Kautsky, ili ambaŭ dividis viglan interesiĝon pri lingvaj demandoj. Diference de Kautsky, Lenin pledis por la rajtoj de minoritatoj kaj kontraŭ la privilegiigo de iu lingvo, sed ankaŭ li insistis, ke la postuloj de la ekonomio diktas la uzon de komuna lingvo; li fidis, ke ĉiuj civitanoj de la soveta ŝtato libervole konvinkiĝos pri la utilo de la rusa lingvo kiel interkomunikilo. En internacia skalo Lenin same kalkulis pri la kreskanta signifo de kelkaj ”mondlingvoj”,

5 Same en 1887 aperis la verko de Kautsky, *Karl Marx' ökonomische Lehren* (La ekonomiaj teorioj de Karl Marx), poste tradukita en 18 lingvojn, kiu popularigis la enhavon de *Das Kapital* (La kapitalo).

Tradukos la maŝinoj perfektstile  
 Laŭ manier' Ŝekspira, Vergilia;  
 Ho, jen la sciencistoj solvas brile  
 Problemon de l'diskut' internacia:  
 La vojaĝonto pagos sian groŝon,  
 Kaj komputilon metos en la poŝon.  
 Nur unu tubereto en l'afero —  
 Ĝis tiam oni devos tro atendi...  
 Ĝis nun ne granda estis la prospero  
 De provoj la investon dividendi,  
 Kaj antaŭ plenumontoj de l'espero  
 La voj' tre longe ŝajnas sin etendi.  
 Ĉu fakte oni venus al la cel' — ah! —  
 Vivante ĝis la aĝ' de Metuŝelaĥ?  
 Sed vidu, jen miraklo! Ĉar animon  
 Planlingvo ne posedas (oni diras),  
 Ne povas ĝi transpreni la sublimon  
 De l'kulturbazoj, kiujn ni admiras  
 En nacilingvoj, kaj pro tio glimon  
 De vivantec' neniam ĝi akiras:

Sed tion la maŝinoj povos fari! —  
 Alie, kial vane tempmalŝpari?  
 Nu, ĵetu for sarkasmon, for acerbon!  
 Ĉi estontulojn mi ja ne envias.  
 Mi havas komputilon: mian cerbon,  
 Kaj ne tro manke ĝi jam nun funkcias,  
 Ne nur ampleksas la natursuperbon  
 Sed ankaŭ pensas kaj intuicias;  
 Per ĝi spertiĝas kulturprovianto  
 En nacilingvo — kaj en Esperanto.  
 Kiom necesas tradici' miljara  
 Al meza homo en naciaj kadroj,  
 Kiu kontentas vivi ordinara?  
 Lerninte sian lingvon de l'gepatroj,  
 Li ĝin adaptas laŭ la mod' najbara;  
 Ne tre influas libroj aŭ teatroj...  
 Ĉu tiu lingvo tamen ne sufiĉas?  
 Ĉu sen kulturo li ne kompreniĝas?  
 Do kial Esperanto devas havi  
 (Se ĝi ne havus!) kulturtradicion,



la angla, germana, franca kaj estonte la rusa. Pri nova lingvo kiel Esperanto nek Kautsky nek Lenin serioze interesiĝis.

Ne eblas prezenti tie ĉi detalan analizon de la penso kaj influo de Kautsky. Entute, la grava temo "marksismo kaj internacia lingvo" atendas pli fundan studon.<sup>6</sup> Sed, estante stimilitaj per la hazarda koincido de la samjaraj opiniesprimo de Kautsky kaj iniciato de Zamenhof, ni elstarigu du aspektojn de la problemo.

### Vivoforto de la lingvoj

Unue, trudiĝas komparo inter la antaŭvidoj de 1887 kaj la nuntempa situacio. Kiom inklinis Zamenhof al iluzioj, ni ĉi-loke ne detaligu, sed pri Kautsky ni hodiaŭ povas konstati, ke li grave subtaksis la vivoforton de lingvoj, inkl. dialektojn, kaj nacioj. Regionismo, ekzemple, estis per revolucioj kaj la kreiĝo de naciaj ŝtatoj preskaŭ ekstermita; nun, en tempo de kreskanta internacia kunplektiĝo, ĝi plifortiĝas. Multlingveco ĝenas, eĉ pli ol antaŭ naŭdek jaroj, la tutmondan komunikiĝon; la nombro de lingvoj internacie bezonataj tamen ne malkreskas, sed daŭre kreskas. Kia solvo estos trovita, neniuj povas hodiaŭ profeti, sed la evoluo ne ŝajnas iri en la direkton de unulingveco laŭ la supozo de Kautsky. Nian epokon karakterizas la tendenco unuflanke al pli forta tutmonda interdependeco sur ekonomia kampo, aliflanke al daŭra, eĉ intensiĝanta fiero de la homoj pri sia gepatra lingvo.

Kvankam Kautsky neniam pledis por la perforta asimilado de nacioj, sed imagis, ke la liberigita tutmonda proletaro frate interkonsentos rezigni la naciajn ligojn, lia ortodokse marksisma teorio montris

6 La aŭtoro estas preparanta studon pri la temo kaj tial bonvenigas rimarkojn.

malkomprenon de la aspiroj de pli malgrandaj nacioj. Sekve, ĝi povis inspiri en la praktiko al politiko de subpremo — al tio, kion Zamenhof, ano de persekutata gento, karakterizis kiel "englutemecon de nacioj kaj lingvoj fortaj kontraŭ nacioj kaj lingvoj malfortaj".<sup>7</sup> Celante nepre subigi naciecan celadon al klasbatalo, Kautsky objekte proksimiĝis al lingva imperiismo.

Due, ni rimarkas, ke inter la eraraj konkludoj, al kiuj venis Kautsky, kiam li — principe korekte — difinis la bezonon de internacia komunikilo, troviĝas lia kontraŭstaro al artefarita lingvo. Fakte, lian artikolon de 1887 oni povas preni kiel elirpunkton de la esence negativa sinteno de marksistoj al la demando de neŭtrala internacia lingvo — en tiu senco, ke ĝi ne nur forlasis la ideon pri supernacia, universala lingvo, kiu certagrade estis heredaĵo de la utopia, antaŭmarksia socialismo, sed samtempe rekte ekskludis la eblecon, ke lingva unueco kreiĝos per la vojo de artefarita lingvo. Eĉ pli: La argumentado de Kautsky faciligis al marksismaj teoriistoj (ofte poliglotaĵoj, cetere) entute nei la utilon de helpa lingvo kiel Esperanto en la periodo **antaŭ** monda revolucio.<sup>8</sup> Ili rilatis al Esperanto aŭ tute indiferente aŭ eksplicite riproĉis al la esperantistoj, ke ili antaŭtempe laboras por io, "kion nur ekonomia evoluado kaj konkurado fine difinos".<sup>9</sup>

7 Homarano, "Pri la homaranismo. Respondo al P-ro Dombrovski". *Ruslanda esperantisto*, vol. 2, 1906; represita en L.L. Zamenhof, *Originala verkaro*. Leipzig 1929, p.334.

8 Vidu ankaŭ Karl Kautsky, *Die Vereinigten Staaten Mitteleuropas* (La unuigintaj ŝtatoj de Mez-Eŭropo). Stuttgart 1916, p.52; tie li montras komprenemon por la strebo al neŭtrala, artefarita lingvo. Sed denove li pledas, ke unu el la naciaj lingvoj iĝu mondlingvo; la opozicio kontraŭ tio estos en socialisma socio malpli forta, ol "hodiaŭ".

9 Cit. Mark Starr, "Marksismo kaj esperanto". *Sennaciulo*, vol. 4, 1927/28, p.355.

Por ke la homoj povu jam ne sklavi  
En ĉenoj de l'muteco? Kial tion  
Premisas certaj disdegnuloj? Ta! vi  
Jam bone scias, ke privilegion  
Pretendas homoj, kiujn malallogas  
La homamas', kaj ili do mensogas —  
Ĉar ĉu valorus havi luksan domon,  
Aŭtomobilon de l'plej kosta marko,  
Amorantinon en peltar', diplomon,  
Maran krozadon en privata barko,  
Aviadilon, eĉ aerodromon,  
— Privilegiojn de la oligarko —  
Se tiuj samaj estus je dispono  
De senescepte ĉiuj laŭ bezono?  
Kaj kiom longe daŭrus la potenco  
Tenata firme en la rondoj klikaj  
Bone sciantaj pravon de l'sentenco:  
La lingvoj estas iloj politikaj,  
Se foje disvastiĝus nia senco,  
Kaj falus altaj muroj lingvobrikaj?

Mi tro komprenas (ne pli bone ol vi):  
Ĥaŝon multaj eĉ ne **volas** solvi!  
"Danĝera lingvo"! — ne nur al adeptoj,  
Sed ankaŭ al aliaj certagrade,  
Ĉar ĝi atestas falson de konceptoj,  
Kiu konsolas kelkajn tre persvade...  
Sed ĉu ni vere estas la esceptoj  
Kaj malĝentile trudas nin parade?  
Mi kredas, ne. La vero estas jena:  
Ni havas ion, kiu estas bona.  
Ne venas ni detruiri. Ne. Kontraŭe.  
Konservon de bonaĵoj ni subtenas:  
Veturas ni en jeto, ne landaŭe,  
Sed nur ĉar tio al l'epok' konvenas;  
Lingvojn apoge ni, ne anstataŭe,  
Pritraktas, ĉar perfekte ni komprenas  
La ĉagreniĝon de naci' malgranda  
Sub peza prem' de lingvo alilanda —  
Kiu pli bone? Ni mem tion spertas!  
Al ni rivalas angla lingvo dume;



En la socialisma movado Esperanto estis longtempe konsiderata kiel frukto de kabineta intelektula laboro, kreaĵo de burĝa pacifisto, kiel ligita kun klasharmoniiga ideologio (aŭ okaze kun misa maldekstrumo), kiel ludilo, kiu laboristojn forlogas de la unuarangeco de klasbatalo.

Stalin en 1930, kvazaŭ memorante pri Kautsky, renovigis la tezon, ke en fora estonteco la homaro parolos unu lingvon. Sed ankaŭ la nuna soveta teorio pri universala lingvo en komunisma mondordo apenaŭ konsideras utiligi la spertojn de Esperanto; oni antaŭvidas aŭ la universaligon de iu granda nacia lingvo aŭ ian kunfandiĝon de naciaj lingvoj. Eĉ kiam estas parolo pri kreota scienca sintezo de ekzistantaj lingvoj, ni trovas la kuriozan kontraŭdiron: Oni pledas por estonta tutmonda lingvo, science altgrade perfektigita, nur tre nebule skizante la atingeblojn de tiu utopia celo, dum samspire al la esperantistoj, kiuj la projekton de 1887 kolektive evoluigis al vivanta lingvo — procedo, kiu devus fascini ĝuste marksistojn —, oni riproĉas utopiemon, admonante ilin atendi ĝis la maturiĝo de la historiaj kondiĉoj. Ankaŭ tia prokrastemo povas favori lingvan imperiismon. <sup>10</sup>

La indiferenta aŭ negativa starpunkto de marksismaj teoriistoj ne povis malhelpi la grandan popularecon

10 Vidu Stojan Ĝuĝev, "Interlingvistika utopiismo". *Paco*, vol. 23, 1976, n-ro 4, p.10; n-ro 5, p.11. La artikolo kritikas la verkon de E. Svadost, *Kak vzniknet vseobščij jazyk?* (Kiel estiĝos tutmonda lingvo?) Moskva 1968. Kvankam Svadost (p.165-169) kontraŭas la tezojn de Kautsky, li siavice venas al eraraj konkludoj pri Esperanto, ĉefe pro ideologiaj antaŭjuĝoj. Notu ankaŭ la aserton de la sovetaj teoriistoj N.M. kaj S.T. Kaltaĥĉjan, ke "la transformiĝo de tiu aŭ alia [nacia] lingvo en tiel-nomatan mondlingvon neniam kaj por neniu estas minaca" (cit. laŭ la germana traduko *Nation und Nationalität im Sozialismus* [Nacio kaj nacieco en socialismo], Berlin 1976, p.80).

de Esperanto inter laboristoj, precipe post la Unua Mondmilito, kiu estis malkaŝinta, ankaŭ en rilato al Kautsky, la fiaskon de la teorie proklamita internaciismo de proletoj. La laboristoj, kiuj aplikis Esperanton, per desuba premo fojfoje eĉ atingis apogon de gvidantoj, almenaŭ tiel longe, kiel tiuj agnoskis la spontanegan strebon al internaciismo kaj ne konsideris la uzon de Esperanto kvazaŭ devia formo de internacia komunikado. En la nuna tempo la Esperantomovado kontentige disvolviĝas en la landoj, kiuj sekvas tiun aŭ alian vojon al socialismo. Sed la transiro al marksisme bazita teoria pravigo de la disvastigo de Esperanto en la nuna epoko estas tasko, apenaŭ komencita.

Ulrich Lins

N. Z. MAIMON:

## Naĥum Slouŝĉ — la forgesita pioniro

TRI HEBREAJ VERKISTOJ aliĝis al Esperanto en ĝiaj unuaj jaroj: Hanec, Naĥum Slouŝĉ kaj Ben-David. Ili estis la unuaj Esperanto-pioniroj inter judoj, hazarde ankaŭ unuaj aktivuloj por la revivigo de la hebrea kiel ĉiutaga, parola lingvo. Ili ne sentis malakordon inter du aspiroj: la revivigo de lingvo nacia kaj la enkonduko de lingvo internacia.

Ben-David (Lev Akimoviĉ Davidoviĉ) fariĝis esperantisto en la jaro 1894, dum Hanec kaj Slouŝĉ apartenas al la unua milo, kiu lernis Esperanton. Ambaŭ estas

Do estas tre bonŝance, mi asertas,  
Ke mi parolas l'anglan — proksimume! —  
Denaske, ĉar pri lingvoj mi mallertas.  
Do se mi devus lerni, minimume,  
La anglan kiel fremdan esprimilon,  
Mi regus ĝin samkiel porko trilon!  
Ne timu, homo. Sidu ne tro zorge.  
Permesu vorton ja ne tre ĝentilan:  
La anglan lingvon regas same porke  
Kiu ĝin lernis, fremde malfacilan.  
Kaj tamen ni konstatas (kun dolor') ke  
Ĝi havas karakteron tre utilan:  
Ĝi signas dum konversaci' aŭ klaĉo  
La indiĝenon disde l'fremdulaĉo.  
Fi! kia diro! Sed konvenas foje  
Paroli iun rekte en la nazon...  
Tro multaj subkonscias paranoje  
Kaj vartas superece ĉi emfazon;  
Ĉe Esperanto, mi konstatis ĝoje,  
Ni malpli ofte havas la okazon —

Ĉar fakta la malnova kliŝo trajtas:  
En Esperanto ĉiu egalrajtas.  
La venkon de la angla mi ne kredas.  
Ĝi havas ĉion: monon kaj prestiĝon;  
Potencon politikan ĝi posedas —  
Kaŭzas la nura pens' al mi vertiĝon! —  
Kaj tamen, tamen. Tamen mi ne cedas  
Rilate ĝian finan nesufiĉon!  
Ĉar malgraŭ ĝia kresko hipertrofa,  
Validas plu logiko zamenhofa;  
Ne ripetendas jam la tuta gamo:  
Faligos l'anglan fine emocioj,  
Ĉar ĉie sub ĝi brulas la malamo  
Ĉiam latentaj inter la nacioj.  
Pri Esperanto ne validas samo:  
Malgraŭ kvereloj kaj antipatioj  
Personaj, (kial honti en silento?)  
La amo estas nia postamento!  
Niaj martiroj ja ne mortis vane,  
La karavan' pluiras, laŭ l'proverbo.



listigitaj en la Unua Adresaro de 1889. Tie, sub numero 870, troviĝas Naĥum Slouŝc.

Li naskiĝis la 25an de decembro 1872 en Smorgon apud Vilno kaj mortis en 1966 en Gedera (Israelo). Kiam li estis 10jara, la familio translokiĝis al Odeso. La Biblion kaj Talmudon li studis hejme ĉe sia patro, kiu estis rabeno; en komerca lernejo li lernis la lingvojn rusan, francan, germanan kaj anglan. En la aĝo de 15 jaroj Slouŝc komencis aperigi artikolojn en hebreaj gazetoj. Kvankam juna, li baldaŭ iĝis aktiva en la juda publika vivo: en la hebrelingva renesanco, en la movado Ĥibat Cion (en kiu ankaŭ Zamenhof portempe aktivis) kaj en la cionisma organizaĵo de Herzl. En la pariza Sorbono li studis semidajn lingvojn kaj post sia doktoriĝo atingis altajn poziciojn: De 1904 ĝis 1908 li estis profesoro pri novhebrea literaturo en la sama universitato, poste ĝis 1914 arkeologo kaj folkloro esploranto en la servo de la franca registaro.

Dum tiuj jaroj li multe vojaĝis. Dum la Unua Mondmilito, de 1916 ĝis 1918, li restadis en Usono, kaj fine – en 1919 – li establis sin en la tiama Palestino kiel estro de la "Asocio por Arkeologia Esplorado", entreprenante elfosadojn en Tiberio, Transjordanio kaj en la valo Kidron apud Jerusalemo.

La literatura kontribuo de Slouŝc konsistas el artikoloj publikigitaj en la hebrea gazetaro, hebrea tradukoj de Zola, Maupassant, Flaubert kaj sciencaj verkoj en la hebrea kaj franca lingvoj, inter ili *Renaissance de la littérature hébraïque, 1743-1885* (Renesanco de la hebrea literaturo...), 1902, poste tradukita en la anglan, *Etude sur l'histoire des Juifs et du Judaïsme en Maroc* (Studo pri la historio de la judoj kaj judismo en Maroko), 1906 kaj *Poésie lyrique hébraïque contemporaine* (Nuntempa hebrea lirika poezio), 1911. Krom tio aperis libroj, en kiuj Slouŝc priskribis siajn vojaĝojn kaj

arkeologiajn elfosojn. Duvoluma kolekto de lia verkaro estis publikigita en 1938-43.

La scienca aktivado kaj multaj vojaĝoj de Slouŝc – li ankaŭ partoprenis kiel delegito ok cionistajn mondkongresojn – kaŭzis, ke lia Esperanta agado restis limigita. Jam en 1891 li iris al Palestino por ekzameni la eblecojn de koloniigo; duan fojon li restadis tie en 1896. Post sia reveno li aliĝis al la vigla Esperanto-grupo en Odeso, kunlaborante kun sia amiko Ben-David. Kiam tiu post nelonge mortis, Slouŝc denove forlasis la urbon. Postrestis el lia plumo unu Esperanta artikolo: nekrologo pri Ben-David, la frumortinta kolego, kiun li priploras trioble – "kiel amikon, kiel esperantiston kaj kiel verkiston hebrean".<sup>1</sup>

En alia, hebrelingva artikolo pri Ben-David li rakontas interesan detalon pri sia Esperanta agado:

Li (Ben-David) estis unu el la aktivuloj de la Odesa Esperanto-Societo kaj en la pasinta vintro komencis – kune kun la verkinto de tiuj ĉi linioj – traduki la Pentateŭkon en Esperanton, rekte el la hebrea originalo.<sup>2</sup>

Fakte, la iniciato por traduki la Biblion venis de Ben-David, sed lia morto interrompis la komune komencitan laboron. Slouŝc tamen supozeble tradukis alian biblian fragmenton, kiu aperis anonime en 1910 ĉe la Presa Esperantista Societo en Parizo sub la titolo *La Biblia Profeto Cefanjaho, antaŭanoncinta Esperanton*. La traduka principo, kiun la anonimulo aplikis kaj de kiu George Rust donas ekzemplojn<sup>3</sup>, tre similas al la

1 *Lingvo internacia*, vol. 3, 1898, n-ro 3; represita en *Tamen la afero progresas!* (Verkaro de Zamenhof. 4.) Kioto 1975, p. 329-330.

2 *Hacefira*, 1898, n-ro 289.

3 George Rust, "Historio pri la Esperanto-Biblio". *Biblia revuo*, vol. 5, 1969, p. 263.

(Proverb' alia trudas sin slogane:

En niaj cerboj ja ne kreskas herbo! ).

Tiom da homoj plu samideane

Tra l'tuta mond' laboras ĝis elĉerpo

Por la afero! Ĉi sindono daŭros

Ĝis – iam – nin sukceso fine laŭros.

Kaj vidu, Simo, min ne tre koncernas

La "fina venko", se paroli vere.

"Fermita rondo"? Ĉu ni fakte fermas

En sorĉan rondon nin, socipretere?

Sed se ni kiel lumgardantoj kernas

Ĝis venos nia ĝusta hor' konkere?

Nu, preferindas tio ol mallumo

Trovebla en L'Eŭropa Komunumo!

Mortigi Esperanton ja ne eblas –

Provadis pluraj dum la historio,

Sed nian naŭdekjaron ni celebras

En plena fida forto de l'funkcio,

Fanditaj en formujon, kiu nepras

Al homoj de aparta simpatio,

Do ĉiu, kiu tra la mondo tuta

Ja hontus esti muta, aŭ balbuta!

De l'mod' ni ne dependas, sed la modo

Iam al ni favoros, mi supozas:

Post stagno venos nia periodo...

Sed intertempe mi ne tre neŭrozas

Pri l'ŝajnas malsukceso de l'klopodo,

Ĉar Esperanto lingve grandiozas

Kaj, per ĝi, al anim' anim' parolas,

Pruvante, ke kapablas kiu volas...

Do ĉimomente mi permesas al mi,

Skribante ĉi leteron al amiko

En eksterland', se ne precize psalmi,

Almenaŭ rimi pri la aŭtentiko

De nia revo, nia ver', kaj varmi

Pri renkontiĝ' kun vi en Rejkjaviko –

Kie denove ĝuos ni gargarojn,

Kaj parolados – spite lingvobarojn!

11 – 14a de majo 1977

William Auld



principo aplikita de Ben-David kaj Slouŝc en Odeso: skrupula laŭvorta traduko, ekzakta transdono de hebreaj esprimoj, imitado de la verbkonjugacio, por ke la traduko estu – dank' al la esprimeblo de Esperanto – "la plej proksima (al la originalo), pli ol tiuj de ĉiuj aliaj lingvoj".<sup>4</sup>

Oni povas demandi sin – kiel faras George Rust –, ĉu la anonimulo ne estis Ben-David mem. Sed ĉi tiu baldaŭ mortis; restis nur Slouŝc, kiu havis la lingvajn kapablojn por entrepreni tian tradukon. Se la tradukinto

<sup>4</sup> Cit. el hebrelingva artikolo de Ben-David en *Hamelic*, 1897 04 02.

estus Ben-David, ne ekzistus kialo post lia morto eldoni la libron anonime. Krome, pro la aperloko Parizo, tiutempe la restadejo de Slouŝc, kaj pro la jaro de apero ne estas multe da dubo, ke la tradukinto efektive estas Slouŝc. La anonimecon kredeble li preferis pro sia alta pozicio en la servo de la franca registaro.

Jen ĉio, kion ni povis malkaŝi pri la Esperanta agado de Slouŝc. Li postvivis ĉiujn fruajn esperantistojn. Estante multe okupita kaj ofte survoje, li staris flanke de la Movado. Tial lia nomo estas forgesita inter la esperantistoj. Kiam li, 94jara, mortis, neniŭ en Israelo konsciis, ke forpasis eble la plej frua, plej longe vivanta disĉiplo de Zamenhof.

N. Z. Maimon

## Recenzoj

# Inter revo kaj realo...

### Recenzas Petar Stefanović (Jugoslavio):

**La ĥimeroj / Les chimères**, de Gérard de Nerval (1808-1855). El la franca trad. G. Waringhien. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1976. 74p. 20cm. Dulingva eldono.

Dediĉante la 3an volumon de la beletra serio "Plejado" al la franca poeto, Lina Gabrielli omaĝas al la tradukinto, okaze de la 75a datreveno de lia naskiĝo.

Por tiu ĉi dulingva eldono Waringhien verkis 10-paĝan antaŭparolon en la franca kaj Esperanto kun kronologio de la vivo kaj, en formo de aldono al la sonetaro de Nerval, 12-paĝan komplekson da notoj, nur en Esperanto.

Konsiderante la tutan nervalistan ekzegezon – abundan, hipotezan kaj kontraŭdiran – kaj liverante la esencajn referencojn, la prezentanto retenas ĉion, kio alportas klaran kaj nekontesteban eksplikon, ne volante kuntrieni sian leganton en la kabalistajn meandrojn, tro kutimajn al la kritiko okaze de *La ĥimeroj*. La fontojn de ĉiu el la sonetoj Waringhien rimarkigas en la verko mem de Nerval. Oni ne povas pli bone aperigi la ekstremajn kaj malrapidan densiĝon de persona sperto entenata en la dek du sonetoj. Oni ne povas pli bone demonstri samokaze, ke la sekretoj de la nervalo verko estas en la vivo de la poeto, aŭ pli ekzakte en lia vivo revita. Ĉar, se Nerval serĉas simbolojn, el kiuj li kunmetas personan sistemon, li faras tion nur por la bezonoj de sia verko. Ekzistas do nervalo simboliko, kiun estas necese koni por bone sekvi la disvolvadon de la verko, kaj ne por tiri el ĝi ian filozofion pri la mondo. En la soneta dekduo de *La ĥimeroj* (1854) disfloras, post la renkontiĝo kun Jenny Colon – la virino al kiu Nerval enamiĝis en 1836 kaj kiu estis renversanta lian vivon – la ĉefaj temoj de lia verko,

oni povus diri ankaŭ de lia vivo: serĉado de tiu ideala virino, kiu de ĉiam estis promesita al li por prilumi lian vivon, neatingebla feliĉo kaj nostalgio pri alia mondo.

Fidela al la franca poezitraduka tradicio, Waringhien penis konservi la elvokan valoron de la vortoj kaj la mirindan povon de la nervalaj imagbildoj, "foroferante laŭokaze pli tradiciajn regulojn", tio estas prozodiajn ekvivalentojn de la originalo. Foje, la sukceso havas ion de la miraklo (ekz. "Mirtoa"). Plej ofte, la tradukoj donas proksimumon de la originalo. Foje, la rezultoj estas ne tute kontentigaj. (Bedaŭrinde, tio okazis ĝuste pri unu el la du juveloj de la sonetaro – "Artemisa"). Entute, tiu populara eldono povas samtempe kontentigi postuleman nervaliston kaj permesi al la plej larĝa publiko alpaŝi *La ĥimerojn* kun profito.

**Prezo:** 13,50 (por Nederlando 14,04) gld., plus sendokostoj 10%.

## Argentina muziko

### Recenzas Lajos Lesznai (Hungario):

**50 argentinaj folkloraj kanzonoj; Kantoj kaj muzikskribaĵoj**, Kompilis Horacio Ré (1937- ). Diamante (E. Ríos): Argentina Esperanto-Muzikeldonejo, 1974. 64 + 93p. Kser. 17cm.

**50 argentinaj tangoj**, de Ergoto de Bonaero kaj Horacio Ré. Diamante (E. Ríos): Argentina Esperanto-Muzikeldonejo, 1975. 58p. Kser. 17cm.

**Suplemento** (al 50 argentinaj tangoj). Diamante (E. Ríos): Argentina Esperanto-Muzikeldonejo, 1975. 93p. Kser. 17cm.

**Internacia kanzonaro**. El la hisp. kaj portug. tradukis Horacio Ré kaj Ergoto de Bonaero. Diamante (E. Ríos): Argentina Esperanto-Muzikeldonejo, 1976. 105p. Kser. 17cm.

Antaŭ mi estas kvar kajeretoj. Ili enhavas esperantigitajn kantojn el Argentino kaj el aliaj landoj de Sud-Ameriko. Kelkloke ne estas facile trovi la muziknotojn, apartenantajn al tiu aŭ alia teksto; eĉ estas troveblaj tekstoj



sen muziko. Do, por povi pli bone uzi la kantkolektojn, la redaktoro estus devinta trovi iom pli uzeblan sistemon por la ordo de la kantoj.

La muziko de ĉi tiuj eldonaĵoj estas dancmuziko, komponita de diversaj aŭtoroj. Same tia dancmuziko estas la enhavo de la kajero titolita *50 argentinaraj folkloraj kanzonoj*. La laste menciitaj kantoj tute ne estas vere folkloraj. La folkloraj muziko ja estas aro de melodioj, eksonantaj per la buŝo de la popolo, vivanta en proksima kontakto kun la libera naturo (kamparanoj) aŭ kun la fizika laboro (laboristoj), kiel esprimo de ĝia instinkta estetika sento.


Oni povas diskuti pri la valoro de la dancmuziko. Mia opinio estas, ke en kunveno de esperantistoj, kie oni deklamas klasikajn poemojn – ekzemple de Zamenhof aŭ Baghy – kantado de dancmuziko ne estas deca. La dancmuziko havas alian socian rolon – servi kiel akompano de la danco.

**Prezoj:** Ĉi tiuj libroj estas senpage riceveblaj ĉe la eldonejo (AEM, p/a prof. Horacio Ré, Etchevehere 522, Diamante (E. Ríos), Argentino). Skribante, oni aldonu 4 internaciajn respondkuponon por afranko de ĉiu petata ekzemplero. **Ne mendu ĉe UEA.**

## Vivas antikvaj sagaoj

Recenzas C. Conterno Guglielminetti (Italio):

**Mastro de Kōrboja, La**, de A.H. Tammsaare (1878-1940). El la estona trad. Benita Kärt. Tallinn: Eesti Raamat, 1976. 154p. 17cm.



Ne mortis la antikvaj sagaoj.

Ilia kantado travagas betularojn, igas iliajn foliojn tremeti, bruligas tremolojn kiel kandelojn inter la pinoj, kaj fine la melankolio de la morto kovras ĉion per tomba tolaĵo, aŭ la aspiro al alta bono savas la rolantojn el la perejo.

Kiom da ili resonas en la modernaj nordaj literaturoj! Kaj jen, unu el ili fariĝas realaĵo ankaŭ por ni, ni povas nin allasi al ĝia lulanta kantado, kaj fakte ne temas pri antikvaĵo, sed pri moderna estona verko el 1922. La aŭtoro, A.H. Tammsaare, naskiĝis en kamparana familio, kaj el sia deveno li prenis la revantan amon al la estona pejzaĝo, kiu estas la fono de la romano. Sed, mi ne emus nomi ĝin romano; ĝi estas kanto, antikva popolkanto revivigita de la aŭtoro; tio estas mia im-

preso dum mi legas la majstre tradukitajn paĝojn. Benita Kärt sukcesis konservi la sorĉon de la originalo; la rolantoj parolas simple, kaj la vortoj ofte estas rekantitaj, kiel se la aŭtoro oscilus inter prozo kaj poezio. Tio estigas la ĉarmon de la verko; la romanfadenado malpli gravas, kvankam la balanciĝo de Villu, Villu la sentaŭgulo tamen sentema kaj ne malbona, spirita frato de Peer Gynt, inter du virinoj tenas nin atentaj ĝis la tragika fino de la historio.

Mi fermis la libron kun malĝojo, ke ĝi finiĝis: tio estas la plej forta sento, kiun aliaj legintoj havos.

**Prezo:** 4,50 (por Nederlando 4,68) gld., plus sendokostoj 10%.

## Laste aperis...

**Ĉevalido transiras riveron**, Min Jang. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1976. 16p. Ilustris Ĉen Yonggen. 18cm. Fablo. Prezo: 0,90 gld.

**Francisko el Asizo; Profeto por nia tempo** (1973), N.G.M. van Doornick. El la nederlanda tradukis E. N. Mulders. Romo: IKUE-Centro, 1976. 320p. 17cm. Biografio kaj analizo pri la ideoj de la katolika pensulo (ĉ. 1181-1226), aŭtoro de *La Floretoj*. Prezo: 15,00 gld.

**Frithjof-sagao / Frithiofs saga** (1825), Esais Tegner (1782-1842). Elsvedigis Wilhelm Theodor Oeste. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1976. 385p. 20cm. Plejado 2. Dulingva (sveda-Esperanta) eldono de eposa poemo. Prezo: 36,00 gld.

**Himno de la kreitaro**, S. Francisko el Asizo (1181?-1226). Romo: IKUE, 1976. Dek koloraj bildkartoj, kun po 2-4 versoj de la fama himno sub diversstemaj belaj fotoj. Prezo: 2,10 gld.

**Horizons nouveaux; Guide de scoutisme international**, J.K. Hammer. Tradukis el Esperanto Patrick Deveughele. Skolta Esperanto-Ligo, 1977 (ne indikita). 32p. Ilus. 14cm. Konsilaro pri internaciaj skoltaj agadoj, kun informoj pri Esperanto. Prezo: 1,50 gld.

**Jarlibro de Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj** 1977. Paris: IAdEM, 1977. 24p. 21cm

**Ruim zicht; Op internationaal scoutswerk**, J.K. Hammer. Tradukita el Esperanto. Skolta Esperanto-Ligo, 1977 (ne indikita). 32p. Ilus. 14cm. Konsilaro pri internaciaj skoltaj agadoj, kun informoj pri Esperanto. Prezo: 1,50 gld.

**Ruza griza lupego**, Giang Ginĉeng. Adaptis Ju Tianci. El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1976. 26p. (nenumeritaj). Kolorilus. 18cm. Bestfabelo kun pentraĵoj de Ĉen Jonggen. Prezo: 0,90 gld.

**Vilaĝano el Poltavo**. Zürich: Mondo, 1976 (neindikita). 16p. 16cm. Bela eldono de sprite ilustrita (Fritz Wüstemann) ukraina popolanekdoto, ĉerpita el *Kursa lernolibro* (1913) de E. Privat. Prezo: 3,00 gld.

**Wider horizons; A guide to international scouting**, J.K. Hammer. Tradukis el Esperanto David H. Withey. Skolta Esperanto-Ligo, 1977 (neindikita). 32p. Ilus. 14cm. Konsilaro pri internaciaj skoltaj agadoj, kun informoj pri Esperanto. Prezo: 1,50 gld.

**Wörterbuch Esperanto-Deutsch** (1952), Max Butin kaj Josef Sommer. Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund, 1977 (fotorepreso). 244p. 17cm. Unudirekta. Prezo: 17,40 gld.

**LIBROSERVO DE UEA**, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,- gld.



# Mankis loko por ĉiuj

LA 29an FOJON, la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) invitis dum majo (13a ĝis 20a) al internacia kongreso. La gastiganta lando estis Britio. En la plenplena kongresa centro "The Hayes", en Swanwick, la 346 partoprenantoj el 17 landoj trovis favorajn kondiĉojn: ĉiuj povis loĝi kaj manĝi en la kombinita kastelo-bieno, kun vasta parko, flegitaj golf-herbejoj, ĉiuspecaj salonoj kaj ĉambroj. Ĉiuj programeroj de la kongreso estis bone vizititaj, eĉ la labor-kunsidoj kaj la faka prelego. Sola, sed grava manko estis la bedaŭrinda fakto, ke la kapacito de la domo ne estis pli granda; tial oni devis rifuzi pli ol 150 aliĝontojn.

Dum la inaŭguro oni aŭdis ekskluzive la Internacian Lingvon, ĉar ankaŭ la oficialuloj ĝin uzis: la ĉenornamita komunumestro Roger B. Ferro kaj la reprezentanto de la Britaj Fervojoj, s-ro Verdon-Smith el Londono. LKK-prezidanto Horace Barks dum tiu solenaĵo ricevis Arĝentan Medalon de FISAIC, la Internacia Federacio de Societoj Artaj kaj Kulturaj de Fervojistoj, pro sia 35jara aktivado esperantista, rezulte de kiu troviĝas en Stoke-on-Trent Esperanto-vojo, Zamenhof-parko, trinkejo Verda Stelo kaj busto de Zamenhof en la Arta Galerio. IFEF-prezidanto Giessner en sia malferma parolado alvokis konsciiĝi pri la valoro de krea agado por la homa personeco kaj la progreso de la homaro, valoro kiun la moderna industrio, taksanta nur laŭ prezoj, ne volas rekoni.

La folkloro de Britio prezentigis al ni kun tre malsamaj vizaĝoj: Sakŝalmistoj en buntaj kiltoj kaj dancantaj knabinoj alportis skotlandan atmosferon tuj post la kongresa inaŭguro; la saman vesperon irlandaj orkestro, dancantoj kaj kantantoj ludis, sakŝalmis, dancis kaj kantis en la malnova irlandia lingvo, la gaela; post ili, vira kanthoro prezentis la kimran kulturon, kantante ankaŭ en Esperanto; meze de la kongresa semajno, lernejoj infanoj el Stoke-on-Trent komencis la duan folkloran vesperon per majarba danco; aliaj prezentis irlandan dancon, en kiu viroj kun dikaj bastonoj kaj lignoŝuoj vikle-brue timigis la spektantojn; poste nudpedaj feinoj baletis adoron al la diinoj, laŭ mezepoka spirito; kaj fine, fantazie kostumitaj junuloj prezentis teatraĵeton el la graflando Derbyshire pri morto kaj reviviĝo, simbole por vintro kaj printempo.

## Fakaj trajtoj de la kongreso

La fervojfaka karaktero de la kongreso evidentiĝis ofte: La Terminara Komisiono kunsidis dufoje por vikle pridiskuti la staton kaj daŭrigon de la traduklaboroj pri la seslingva fervojfaka leksikono de la Internacia Fer-



**S-ro Horace Barks (maldekstre) ricevas la Arĝentan Medalon de la reprezentanto de FISAIC, s-ro N. G. Narvala.**

voj-Unio (UIC). "Terminara Kuriero" aperos por la terminaristoj laŭbezone por akceli ilian aktivecon. Promenado tra la kampoj de la bieno finiĝis por multaj ĉe proksima subĉiela muzeeto kun malnovaj vagonoj kaj lokomotivoj. Ekskurso aŭtobusa celis la tramomuzeon en Crich, kie duetaĝaj tramoj ankoraŭ veturas por kaj kun la spektantoj. Faka prelego temis pri "Vagon-dispozicio kaj cirkuladkontrolo ĉe la Brita Fervojo per elektronika operaciado". Kelkaj diapozitivoj faciligis la komprenon, antaŭa filmo montris vartrafikon en Britio ĝenerale, dua filmo poste havis la saman temon kiel la prelego, kaj oni tie eĉ vidis nian preleginton Frank Curtis, kiu same laboras en tiu specialfako kiel la filmprezentanto kaj kongresa fotografisto David Wild: do ili povis perfekte respondi ĉiujn poste starigitajn demandojn. La fakprelega komisiono kunsidis nur mal-longe por ekprepari la prelegon por la venonta jaro en Romo. Faka kulmino kaj kongresa finpunkto estis lasttage la vizito al la ŝtata fervojmuzeo en York, al kies riĉe ilustrita gvidlibro oni aldonis esperantlingvan tekstfolion. Brile poluritaj lokomotivoj kaj vagonoj de 1829 ĝis la plej rapida vaporlokomotivo de la mondo (1938), vidindaĵoj ĉiuspecaj por ĝojsaltigi fervojistajn korojn.

Internacia federacio kompreneble havas siajn organizajn problemojn. Dum tri kunsidoj la estraro, komitato kaj membroj traktis plurajn kongresproponojn, akceptis buĝeton, elektis novan ĉefkomitatano (Lucien de Sutter el Belgio) kaj ellaboris rezolucion direktotan al fervojaj administracioj kaj al la publiko. Apartaj komisionoj okupiĝis pri varbado/informado, alia pri eldona historia broŝuro. Honoraj membroj oni nomis s-rojn: Germano Gimelli (Italio), Jaap Labordus (Ne-



derlando) kaj Jaromir Rebiček (Ĉeĥoslovakio). Dum kongresa balo ĉeestis BBC-televdistoj por intervjui elstarulojn kaj filmi la multkolorajn naciajn kostumojn.

## Zamenhof kaj la fervojoj

Laste sed ne malgrave, menciindas la kunagado de d-rino Marjorie Boulton. Ŝi ne nur instruis laŭ rekta metodo al komencantoj kaj progresintoj, ŝi ankaŭ prezentis spicitan prelegon "Kiel insulto en Esperanto", kun specife fervojaj kompletigoj, kaj ŝia teatraĵeto "Manekena parado" vekis multe da aplaŭdo. Per elokventa kaj emocia parolado la aŭskultantoj travivis diversajn fervojajn vojaĝojn de Zamenhof: kiel timema studento (1879) de Varsovio al Moskvo; esperplene (1905) al la unua mondkongreso en Boulogne, kun triumfa reveturo; paceme (1908) al De Beaufort kaj Couturat post la Ido-skismo; al Barcelona kaj Valencia (1909), kiam oni malkuplis survoje lian vagonon kaj en la tumulto miksiĝis homoj kaj valizoj, poste vagono ekbrulis pro varmiĝinta akslagro, fine eĉ pluvakvo penetris la vagonon; la jaron poste en luksa Pullman-vagono okazis vojaĝo de Vaŝingtono al la Niagara-akvofaloj; fine la lasta vojaĝo (1914) pro la kongreso en Parizo, kiun Zamenhof ne povis atingi, ĉar la mondmilito eksplodis kaj en Kolonjo li estis haltigita, devis reveturi tra Danlando, Svedio kaj Finnlando al Varsovio du 14 tagoj. ...Jen Zamenhof kaj la fervojo, prezentita de d-rino Boulton al la fervojistaj esperantistoj. Prave IFEF ŝin solene akceptis en sian Honoran Patronan Komitaton.

Gernot Ritterspach

## ELEKTOJ POR LA KOMITATO DE UEA:

# Kvin novaj komitatanoj B

POST la anoncoj en niaj n-roj de oktobro 1976, februaro kaj majo 1977, la 20an de junio aparta komisiono (art. 28ĉ. de la Ĝenerala Regularo de UEA) nombris la voĉojn por komitatanoj B kaj konstatis jenon:

El 1194 ĉefdelegitoj kaj delegitoj, en la fino de 1976, siajn voĉdonilojn ĝustatempe resendis 629 voĉdonintoj (52,68%). El la ricevitaj voĉdoniloj, tri estis nevalidaj (voĉdono por pli ol 5 kandidatoj) kaj unu estis blanka (neuzita). Kalkulante, ke ĉiu voĉdonilo valoras kvin voĉojn, la 625 validaj voĉdoniloj egalas al 3125 voĉoj, kiuj dividiĝis jene: **Humphrey R. Tonkin** (Usono) 564 (90,24%), **Carl Støp-Bowitz** (Norvegio) 465, **Terttu Tyynelä** (Finnlando) 441, **Francisko Simonnet** (Francio) 403, **Gustav Kühlmann** (Danlando) 338, **Franko Luin** (Svedio) 322, **Violin Oljanov** (Bulgario) 252, **Jehoŝua Tilleman** (Israelo) 224, neasignitaj (neuzitaj) 116 voĉoj. Sekve, kiel novaj komitatanoj B de UEA, por la laborperiodo 1977-1980, estas elektitaj la unuaj kvin kandidatoj, kies nomoj estas presitaj dikletere.

## LA UNUA INTERNACIA LERNEJO:

# Ni praktikas Eŭropon

AL LA VILAĜO St. Gérard, 19km sudokcidente de Namur (Namen) en la francparolanta ardena regiono de Belgio, veturis 148 infanoj, 9-11-jaraj, por partopreni la Unuan Internacian Lernejon, organizitan de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La junulargastejo (antaŭe monaĥejo) "Abbaye de Brogne" disponigis, inter la 14a kaj 22a de majo 1977, la ejojn por ĉi tiu ambicia projekto.

Partoprenis 52 infanoj el 3 klasoj en FR Germanio (instruistoj: s-ro G. Peek, Balge; s-ro H. Sonnabend, Dollbergen; s-ino K. Ruff, Peine), 48 infanoj el 3 nederlandaj klasoj (s-ro R. Hagedoorn, Waalwijk; s-ino S. Mensen, Soest; s-ro P. van Tol, Wormer), 18 francaj infanoj el 2 klasoj (s-ro J. Bénistant, Le Mans; s-ro F. Le Magadure, Hennebont), 16 belgaj geknaboj el St. Gérard mem (s-ro J. Sondervorst, kiu prizorgis la surlokan aranĝadon de la semajno) kaj 14 infanoj kiuj vojaĝis kun f-ino J. Hudeček el Zagreb, Jugoslavio.



Entute, do, ĉeestis 166 infanoj kaj instruistoj de 10 klasoj el 5 eŭropaj landoj.

Kontraste al la renkontiĝo fine de la unua lerneja eksperimento en Primošten, Jugoslavio, kiu okazis dum la someraj ferioj, ĉi tiu Internacia Lernejo estis aranĝita dum la lerneja jaro mem. Por ke la edukaj instancoj aprobu tion, necesis certigi, ke la studprogramo estu serioza kaj komparebla al la normalaj lernejoj kondiĉoj. En ĉiu el la 8 klasĉambroj estis infanoj el ĉiuj kvin landoj; kelkloke la infanoj en du-naciaj duopoj pretigis taskojn. La formala studado de Esperanto okazis nur dum duonhoro ĉiutage; la aliaj 7 instruhoroj estis dediĉitaj al aliaj temoj:



matematiko, eŭropa geografio, desegnado, muziko kaj sporto, — pere de Esperanto. La temo de la aranĝo "Ne raso, sed ni infanoj loĝas en la mondo" speguliĝis en pluraj el la aktivadoj, kiuj emfazis la kreskantajn kontaktojn inter najbaraj landoj, precipe tiuj de Eŭropo. Pro tio, aparte trafa estis la celo de la tuttaga ekskurso — Bruselo, unu el la ĉefaj centroj de la eŭropa kunlaboro.

Fine de la semajno, belgaj edukaj instancoj kaj aliaj gastoj estis invititaj ĉeesti prezentlecionojn kaj rigardi la produktitajn laboraĵojn. La belga televido kaj gazetaraj raportistoj estis invititaj. Pri la semajno estas produktita aparta vidbenda programo en Esperanto. Jen kelkaj opinioj eldiritaj en tiu programo:

**S-ro F. Le Magadure** (Francio): "Pluraj el miaj lernantoj neniam vojaĝis trajne. . . , preskaŭ neniu iris eksterlanden. Tio ĉi estas tre grava sperto, ĉefe por ni, kiuj



Ili instruis en la Internacia Lernejo (de maldekstre): P. v. Tol (en la unua plano), J. Bénistant, F. Le Magadure, S. Mensen, G. Peek, K. Ruff kaj H. Sonnabend.

havis tre longan vojaĝon. Mi esperas, ke la infanoj konservos bonajn memorojn pri ĉi tiu restado. Kaj tutcerte ili konstatos, ke la esperantistoj ekzistas, ĉar, kiam oni komencis instrui Esperanton al ili, ankaŭ kelkfoje la gepatroj dubis pri nia laboro kaj pri niaj celoj. Sed nun ili povas konstati, ke la infanoj renkontis aliajn infanojn, kiuj ankaŭ lernas Esperanton kaj povas uzi la lingvon. La infanoj vidas, ke ĉi tien venas plenkreskuloj el diversaj landoj, kiuj interesiĝas pri la laboro farita. Mi kredas, ke tio forte impresos ilin."

**S-ro G. Peek** (FR Germanio): "Ankaŭ mi estas certa, ke kelkaj el la infanoj daŭrigos la kontaktojn kun siaj amikoj eksterlande."

**S-ro H. Sonnabend** (FR Germanio): "Estas kompreneble neeble transformi naciecon en internaciecon en la spaco de kelkaj tagoj, sed kio okazas ĉi tie estas kerno, estas komenco. . . Unu celo de la eksperimento estas, ke la infanoj lernu la internaciecon mem. Ili devas havi la senton, ke estas aliaj amikoj en aliaj landoj: Do konkrete, ni ne parolas pri Eŭropo, ni praktikas Eŭropon. Tio estas la celo tie ĉi."

La Unua Internacia Lernejo estas la kulmino de la dua lerneja eksperimento de ILEI, kiu okazis dum la pasintaj du jaroj, sub la gvidado de la prezidanto de ILEI, s-ro H. Sonnabend. La uzita kurso entenis 70 studhorojn kaj baziĝis sur la lernolibro *Sub la verda standardo* de P. Korte. Kvankam la eksperimento nun finiĝas, la plimulto de la instruistoj gvidos aŭ planas gvidi libervolajn daŭrigajn klasojn por tiuj infanoj, kies intereson pri Esperanto nutris ĉi tiu Internacia Lernejo.

Teksto kaj fotoj:  
**Stefan MacGill**

## Kalendaro

### Aŭgusto

- 07-13 45a Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Oslo, Norvegio (O. Prytz, Trøndergt. 1A, Oslo 4)
- 20-25 Somera migrado (SM 77), Sierre, Svislando (SEJ, Verger Rond 18, CH-2000 Neuchâtel)
- 20-26 Tri intensaj E-kursoj, Barlaston, Britio (Barks, 25 Mars St., Smallthorne, Stoke-on-Trent)
- 21-27 Internacia Fiera Altlernejo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds)

### Septembro

- 18-30 3a Int. Esperantista Ferio-Seminario, Velingrad, Bulgario (M. Ĉolev, str. Br. Krastini 14, BG-4600 Velingrad)

### Oktobro

- 03-09 10a Pupteatra Internacia Festivalo, Zagreb kaj Bjelovar, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb)
- 08-09 70a datreveno kaj Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando, Kuopio (E-Klubo, P.f. 119, SF-70101 Kuopio 10, Finnlando)

- 15-16 Trilanda Renkontiĝo, Basel, Svislando (s-ino E. Döring, Spalenvorstadt 7, CH-4051 Basel)
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

### Novembro

- 05-06 Itala kaj Tiĉina Kultura Semajnfino, Como, Italio (Tiĉina E-Ligo, Via Pizzo di Claro 7, CH-6512 Giubiasco, Svislando)

### Decembro


- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Tago de la Esperanta Libro
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 26-05 01 1978 21a Esperantista Skiferio, Adelboden, Svislando (KCE, vidu sub aŭgusto)
- 27-03 01 1978 21a Internacia Seminario de GEJ, Rotenburg, FR Germanio (GEJ, Löwengasse 16, D-6101 Rossdorf 1)
- 31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas.

**NOTO:** Ĉi tie aperas nur aranĝoj, kiuj mankis en nia kalendaro en la marta n-ro de la revuo. Informoj pri novaj aranĝoj aperos verŝajne en decembro 1977.



## YÖNGSIYEBU RINĈEN

Pere de Pola Radio atingis nin la informo, ke en aprilo ĉi-jare, en Ulan-Batoro (Mongolio), forpasis prof. d-ro Yöngsiyebu Rinĉen (1905-1977), fama mongola lingvisto, membro de pluraj sciencaj akade-



mioj, unu el la plej grandaj aŭtoritatoj pri la finn-ugraj lingvoj. Prof. Rinĉen lernis la Internacian Lingvon en 1927, gvidis Esperanto-kursojn en 1933, verkis la unuajn Esperantomongolan vortaron en 1964 kaj lernolibron, kiu havis du eldonojn – 1964 kaj 1966. Li estis tradukanto el la rusa, franca, germana, pola, ĉeĥa kaj Esperanto. Liaj tradukoj de kelkaj fabeloj de Andersen, el Esperanto en la mongolan, havis du eldonojn. Li estis konsiderata kiel la plej vaste konata mongolo de la nuna tempo.

## LAKSHMISWAR SINHA

En Santiniketan, Hinda Unio, la 22an de aprilo, forpasis Lakshmiswar Sinha (1905-1977), disĉiplo kaj amiko de Tagor, eble la plej konata azia esperantisto, se oni esceptas Japanion. Li lernis Esperanton dum siaj studoj en Svedio, inter 1928 kaj 1931. Jam en 1928, li aperigis originalan drameton *Sivaĝi*, kiun en 1930 sekvis *Bengalaj fabeloj* – tradukita ankaŭ en la svedan – kaj en 1931 broŝuro pri homa interkompreniĝo *Kaj ĉio restas penso sed ne faro*. Sinha faris tre sukcesajn prelegvojaĝojn, en 1929 kaj 1930, tra Svedio, Esto-

nio, Latvio kaj Pollando. En 1936 aperis lia interesa verko *Hindo rigardas Svedlandon*. Lia traduko de sep rakontoj de Tagor, *Malsata ŝtono*, en 1961, inaŭguris la konatan libroserion de UEA "Oriente-Okcidento". Rezulto de liaj multaj klopodoj starigi Esperanto-movadon en Hinda Unio estis la fondo de Bengala Esperanto-Instituto en 1963, kiam aperis ankaŭ lia bengallingva broŝuro *Esperanto-movado*. Eldona Societo Esperanto en 1966 publikigis en Svedio la aŭtobiografian verkon de Sinha, *Jaroj sur tero*. La lasta verko de Sinha aperis en 1974 – *Facila Esperanta lernolibro*, en la bengala lingvo.

## ADAMO LACALENDOLA

La 20an de februaro, en Bari (Italio), forpasis d-ro Adamo Lacalendola (1885-1977), emerita profesoro de la tiea universitato, esperantisto ekde 1913, gvidinto de multaj mezlernejaj kaj universitataj kursoj de Esperanto. Prof. Lacalendola prezidis la Italan Kongreson de Esperanto en 1924, kiam li elektiĝis por la funkcio de la prezidanto (1924/25) de Itala Esperanto-Federacio. Longtempe li estis delegito de UEA kaj ankoraŭ en 1976 membro de Societo Zamenhof.

## JUAN DE OYARZABAL

Komence de ĉi tiu jaro, la 2an de januaro, en Meksikio forpasis prof. Juan de Oyarzabal (1913-1977), konata atomfizikisto, kiu lernis Espe-

ranton en 1954 kaj en 1956 kaj 1957 gajnis la unuajn premiojn por la originala poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA. Li aŭtoris multajn fakajn librojn en la hispana; du el ili havas ankaŭ Esperantajn resumojn.

## ANNA RIIS

La 7an de majo en Kopenhago mortis Anna Riis (1910-1977), esperantistino ekde 1935. Ŝi gvidis Ĉe-metodajn kursojn i.a. en Belgio en 1939/40, multe aktivis en la loka Movado kaj i.a. helpis organizi la UK en Kopenhago en 1956.

## KOLOMANO KOVAĈ

En Novi Sad (Jugoslavio), la 20an de majo tragike mortis d-ro Kolomano Kovaĉ (1911-1977), emerita juĝisto, vortaristo. Li esperantistiĝis en 1932, multe verkis pri Esperanto en naci-lingvaj gazetoj, kunlaboris en *La suda stelo* kaj *Jugoslavia esperantisto*, prelegis, tradukis, gvidis E-kursojn. Li verkis *Esperanta-hungara vortaro* (1957), kompilis vortaron serbokroatan-hungaran kaj ĉefredaktis enciklopedian vortaron samdirektan. Sub la pseŭdonimo Ch. Forge, Kovaĉ verkis ankaŭ *Propono por sporta terminaro* kaj en manuskripta formo postlasis kelkajn aliajn fakajn terminarojn.

## CESARE ARIETI

En Romo, la 21an de majo forpasis d-ro Cesare Arieti (1921-1977), unu el la kunlaborantoj de la E-elsendoj en Radio Romo. Li lernis Esperanton nur antaŭ kelkaj jaroj, rapide ek-majstris ĝin kaj gajnis premiojn pro siaj originalaj prozaĵoj.

# Loke

## Italio

- Sekve de radio- kaj televid-intervjuoj en Bari, komence de ĉi tiu jaro, la televida stacio "Telebari" petis la lokan Esperanto-klubon pretigi televidan kurson de la Internacia Lingvo. La klubo promesis prizorgi la kurson por la venonta studjaro kaj bonvenigas ideojn, konsilojn, proponojn k.s. (s-ro Karl-Heinz Renschler, Via Ravanas 318, I-70123 Bari, Italio).

## Soveta Unio

- Laŭ *Budapeŝta informilo* (junio 1977), ĉi-jare aperos nova ruslingva

lernolibro de Esperanto. Oni antaŭvidas eldonkvanton de 50 000 ekzempleroj.

- En la antaŭ nelonge okazinta 15a renkontiĝo de esperantistoj de Volgo kaj Uralo, en la urbo Perm, partoprenis 106 personoj el 16 lokoj. Inter la programeroj estis ankaŭ speciala kurso por tradukistoj.

## Venezuelo

- La jaro 1977 signalas la komencon de rimarkinda disvastigo de Esperanto en la Centra Universitato de Venezuelo (la plej grava de la lando). Dum aprilo finiĝis baza kurso,



gvidita de prof. Jorge C. Mosonyi, kaj organizita de la Direkcio de Kulturo de la Universitato kaj de Venezuela Esperanto-Asocio. La kurson partoprenis ĝisfine 54 studentoj de diversaj fakultatoj. Temas pri la dua kurso tiuspeca; kaj la unua, okazinta dum majo pasintjare, havis en la fino nur 16 studentojn.

- Lino Moulines, membro de la estraro de la Venezuela Esperanto-Asocio, diskutis, antaŭ kelka tempo, pri Esperanto kun Paco Benmaman en ties ĉiumatena programo en Radio Caracas Televisión, unu el la plej prestiĝaj sendependaj Venezuelaj televidstacioj. Moulines parolis ankaŭ pri la fondinto de la Venezuela Esperanto-Asocio, Benito Raúl Lozada, kaj liaj famaj kunlaborantoj post la Dua Mondmilito: Emilio Sojo, Antonio Lauro k.a.

### FR Germanio

- Post la elekto de s-ino Elsbeth Bormann por la funkcio de la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (v. nian junian n-ron, p.119), al ŝia adreso venis telegramo kun jena enhavo: "Kiel mi eksciis el la gazetaro, vi estas antaŭ nelonge elektita nova prezidanto de Germana Esperanto-Asocio. Mi volas tre kore gratuli vin pro tio kaj deziri al vi por la estonteco feliĉon kaj sukceson. Via Helmut Schmidt, federacia kanceliero."

## Fake

### Transporto

- La internacia fervoja kompanio "Intercontainer" (P.f. 138, CH-4010 Basel, Svislando) ĵus eldonis luksan, grandformatan 8-paĝan prospekton kun la titolo "Intercontainer -- nova imago pri la fervojo". La utiligo de Esperanto en ĉi tiu kazo ŝuldiĝas al mag. Gvozden Sredić, iama vicprezidanto de IFEF, nun oficanta ĉe la kompanio en Bazelo. Sredić estas fakulo pri konteneroj kaj jam verkis Esperantan studon pri tiu temo, kiun koncernis ankaŭ lia prelego en ISU dum la 58a UK en Beogrado. La prospekto estas senpage mendebla ĉe la supra adreso.

### Turismo

- Petite verki plurlingvan frazaron por la benzinstacioj de la petrolfirmo "Antar" en Francio, s-ro Jean-

Louis Saudian-Rousseau inkludis ankaŭ Esperanton en la nun presatan manlibron. Tio signifas, ke la eksterlandaj turistoj en Francio estonte renkontos ĉe la benzinejoj de "Antar" deĵorantojn, kiuj kapablos interkompreniĝi ankaŭ en Esperanto.

### Ekspozicioj

- Pere de Esperanto, kunlabore kun "Rondo Hobio" (v. nian febr. n-ron, p.28), la urba muzeo en Edam (ĉe Amsterdamo) aranĝis ekspozicion pri la japana paperfaldado. La klarigaj tekstoj en la ekspozicio, kiu daŭros ĝis oktobro ĉi-jare, estas ankaŭ en la Internacia Lingvo.

## Persono

### Carter

- En sia deklaro de la 22a de marto ĉi-jare, okaze de la Nacia Fremdlingva Semajno 1977, la prezidanto de Usono, Jimmy Carter, interalie diris ankaŭ jenon: "Mia konscio pri la graveco de lingvaj kapabloj fariĝis pli akra pro miaj vojaĝoj en Latin-Ameriko. Mi tie ekkonis la grandegan valoron de la povo komuniki libere kaj senpere je bazo interpersona. ...Amikaj kaj pacaj rilatoj inter nacioj dependas grandparte de plibonigita komunikado inter la individuaj civitanoj. Flueciĝo en alia lingvo estas unu el la plej bonaj manieroj atingi tiun plibonigitan komunikadon kaj antaŭenigi pli bonajn internaciajn kompreniĝon kaj bonvolon."

### Grattapaglia

- La plej granda sud-amerika magazino, *Manchete*, aperanta en Rio de Janeiro en 350 000 ekzempleroj, publikigis en sia n-ro de la 18a de junio 1977 tre ampleksan intervjuon kun s-ino Ursula Grattapaglia, komitatano de UEA, kaj s-ro Giuseppe Grattapaglia, ĉefdelegito de UEA en Brazilo. La 12an de junio, en tutlanda televida programo, en tre populara elsendo, kiun supozeble spektis ĉ. 30 milionoj da homoj, la gedzoj Grattapaglia intervjuiĝis dum 7 minutoj pri Esperanto kaj la komunumo "Bona Espero", kie ili vivas. Kaj, tio ne estas ĉio! La 13an de junio, *Jornal de Brasília*, prestiĝa ĵurnalo de la brazila ĉefurbo, publikigis apartan intervjuon kun s-ino Grattapaglia, kompreneble -- denove pri Esperanto kaj "Bona Espero".

### Premioj

- La juĝkomisionoj de la Esperantaj branĉoj en la internacia literatura konkurso "Larius", organizata en Italio, ĉi-jare devis pritaksi 172 verkojn de 106 aŭtoroj, el 29 landoj. La ĉefajn premiojn gajnis: por originala poezio: A. Goodheir (Skotl.), E. Urbanová (Ĉeĥosl.), J. Kohen-Cedek (Isr.), E. Lippe (Sov.) kaj K. Long (Brit.); por traduka poezio (sub aŭspicio de UEA): M. Nervi (Ital.), S. Simeonov (Bulg.), N. Andrianova (Sov.), G. Halager (Danl.) kaj A. Logvin (Sov.). La konata esperantistino C. Conterno gajnis la unuan premion en itallingva konkursa branĉo.

### Waringhien

- La 11an de junio, prof. G. Waringhien (sur la foto) veturis el Parizo al Bruselo, por tie transdoni al la reprezentanto de la Centra Oficejo de UEA la manuskripton de *Plena*



*analiza gramatiko* (ĉ. 600 paĝoj), kiun venontjare planas eldoni UEA. La renkontiĝo okazis en la redakcejo de *Heroldo de Esperanto*, al kies afableco ni ŝuldas ankaŭ ĉi tiun foton.

### Kehlet

- S-ro Torben Kehlet, eldonisto el Kopenhago, fine de junio ĉi-jare translokiĝas al Belgio. La nova adreso de la Internacia Eldonejo TK estas: Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio. Pro la translokiĝo, ankaŭ la aranĝo pri la kunlaboro inter la eldonistoj Régulo kaj Kehlet (v. nian januaran n-ron, p.2) ankoraŭ ne plene ekfunkciis. Tial oni atendas, ke la popularaj Stafeto-libroj estos denove haveblaj nur fine de ĉi tiu jaro.



## DU PLIAJ KUNLABORANTAJ FAKAJ ASOCIOJ

Per voĉdono finiĝinta la 15-an de junio 1977, la Komitato de UEA akceptis kontraktojn pri kunlaboro kun du pliaj neŭtralaj fakaj asocioj: Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (IAdEM) kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA). La nombro de la kunlaborantaj kaj aliĝintaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj en UEA nur estas 25.

## SOCIETO ZAMENHOF 1977

BRIT: 202 John Brownlee. FINN: 203 N. Kavenius; 204 Heta Kesälä. NED: 205 A.M.E. van Walsem-Schutte. NOR: 206 R. Bugge-Paulsen. SVED: 207 Amy H.L. Nilsson. SVISL: 208 Otto Walder. US: 209 Milton O. Brown; 210 Emma M. Jungton; 211 G. Novak; 212 anonima; 213 R.R. Schmitt; 214 Jaroslav Suchanek; 215 Margaret O. Vick.

## DONACIOJ 1977 (Gld.) ĝis la 31a de majo.

ASOCIA KAPITALO: Aŭstralio: Heredaĵo Desley Davies 981,62. Nederlando: Heredaĵo J.E. Prins 5000,00. Sumo ĝisnuna: 5981,79.

CED: Nov-Zelando: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio 51,40. Sumo ĝisnuna: 51,40.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 40,50. FR Germanio: Bruno Vogelmann 51,13; M. Kossolobow 50,00. Finnlando: Laboristo el Finnlando 125,05. Italio: Nino Vessella 63,56. Kanado: Dorothy May Hawley 350,73. Nederlando: Rob Moerbeek 25,00; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 25,00; W.A. Verloren van Themaat 25,00. Norvegio: Stefan Murak 473,71. Sovetunio: Boris Kolker 15,00. Sumo ĝisnuna: 1282,79.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: André Degrijse 16,95. Hungario: Anonima 84,20. Nederlando: Rob Moerbeek 25,00; F. Zeiler 100,00. Norvegio: Societo de Esperantistoj Laboristaj 255,00. Svedio: Erik Brenander 60,25. Usono: John Dahnke 131,58; G. Spant 6,12; Roger Blaine 48,45. Sumo ĝisnuna: 911,78.

FINANCA PROGRAMO DE LA ESPERANTO-MOVADO: Finnlando: Jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando 197,48. Nederlando: Stichting Levi Lassen 5000,00. Sumo ĝisnuna: 5197,48.

ĜENERALA KASO: Anonimaj 10,00; 25,00. Aŭstralio: R.W. Baxter 18,73. Belgio: C. Vanbiervliet 450,00. FR Germanio: H. Steinberg 52,14; G. Peek 5,30; K. Weller 5,30; H. Sauter 10,43; G. Tucker 5,21; J. Weidacher 5,21; J. Windisch 7,30; H. Meyer 10,43; F. Michalik 15,64. Finnlando: Unto Seppälä 19,73. Japanio: Masahisa Niwa 18,48. Nederlando: W. J. van der Spoel 25,00; A.W. van der Waal 50,00; Ges-roj Moerbeek 25,00; N.L. Daams 10,00. Nov-Ze-

lando: S.R. Perfect 2,57. Svedio: Henning Halldor 1184,50; Anna-Lisa Liss 8,52; Curt Olsson 8,53; Adolf Westman 8,52; Arne Östberg 56,83; K. Gustafsson 51,21; H. Almar 69,29; E. Johansson 9,64. Svislando: M. Pavlović 13,65. Sud-Afriko: C. Beckford 3,75. Usono: Mark Starr 249,43; A. Holzhaus 2,49; W.M. Worrell 58,93; Elizabeth Bieman 58,75; P. Urbaitis 12,32; Daniel Mason 17,41. Sumo ĝisnuna: 3479,94.

PATRONA MEMBRO DE TEJO 1976: 24 Juan Azcuenaga Vierna, Hispanio.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1977: 12 G. Becker, FR Germanio. 13 H.M. Schippers, Nederlando. 14 Margaret Landmark, Norvegio. 15 Rolf Nordström, Svedio. 16 Sergio Martina, Italio. 17 Juan Azcuenaga Vierna, Hispanio. 18 Stefan MacGill, Nederlando.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

## Anoncetoj

*TARIFO: Ĉiu vorto kosta 0,75 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.*

**Vendproponas** E-librojn por 200, E-insignojn 100, poŝtmarkojn 1000, alumetetikojn 200, hotelvalizetik. 100; prezoj en dolaroj. Skribu al: Sopit, Forchstr. 1, CH-8400 Winterthur, Svislando.

**Malnovaj Esperanto-revuoj** interesas min: Ramon Molera, Moyá (Barcelona), Hispanio.

**Vojaĝonte** al Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, skribu sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj.

**NI AFABLE PETAS** la membrojn laŭeble ne skribi al la Centra Oficejo de UEA dum la monatoj julio kaj aŭgusto, se ne temas pri urĝaj demandoj aŭ mendoj. En tiu periodo pluraj oficistoj aŭ libertempas aŭ havas urĝajn kongresajn taskojn. Koran dankon pro via atento!

**Ekde la 1-a de majo 1977** mia adreso estas: R. Kent Jones, Esperanta Lingva Serva Kompanio, 452 Aldine, Apt. 501, Chicago IL 60657, Usono. La telefonnumero restos: 549-0982.

**Samplanedanoj, eksterteruloj,** bonvolu sendi saluton al mia malsana edzo: Petro van Bentum, Hospitalo Leyenburg, Sekcio Neŭrologio, Leyweg 275, Den Haag, Nederlando. Laŭeble respondos danke via, Marjo van Bentum.


**Deziras ricevi** E-literaturon, precipe esperantologian kaj interlingvistikan, ĉefdelegito de UEA: Boris Kolker, Abonkesto 162, SU-450025 Ufa, Sovet-Unio. Rekompenco laŭ interkonsento.

**Pentristo de pupteatro** deziras korespondi kun samprofesiuloj tutmonde: Ŝĉerbakov Boris, p.k. 11, Barnaul-99, 656099, USSR.

**Kiuj deziras lerni** hindian lingvon, hindan muzikon, jogon ktp. — skribu al: R.A. Vyas, Esperanto-klubo, 17/6 Chhoti Gwaltali, Indore (M.P.), 452 001 Hinda Unio.

**Sanskritdevenaj fakterminoj:** Pri ilia esperantigo diskutu kun Frank Ziesing, Centre Védantique Ramakrichna, 77220 Gretz, Francio.





Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1977, p. 66. Mal-longigoj: I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

## Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.  
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 25.42 m (11800 kHz). I.P.  
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

## Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840kHz). I.P. ORF Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.  
10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.  
11.00-11.30 Pekino, 43.35m (6920 kHz), 40.82m (7350 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.  
12.30-13.00 Pekino, 31.95m (9390 kHz), 25.04m (11980 kHz). I.  
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710kHz), 25.42m (11800kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.  
20.05-20.15 Vatikano, 196m (1529 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38 m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.63 m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radio-vaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

## Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.  
18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio,

Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

## Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.) . Ripeto, dek tagojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.  
20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 49.34m (6080 kHz).I. Ibra Radio, Box 396, S-101 25, Stockholm, Svedio.  
21.35-21.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870kHz), 19.60m (15305kHz). Ripeto de la lunda programo.

## Merkrede

18.00-18.10 Berno; ondoj, kiel lunde. P. (s-ro Gacond).  
22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

## Ĵaŭde

18.50-18.55 Vieno, 203m (1475kHz).I.  
21.35-21.45 Berno, ripeto de la lunda programo; ondoj, kiel marde.

## Vendrede

18.00-18.10 Berno, ripeto de la merkreda programo per samaj ondoj.  
20.00-20.30 Pekino, 47.85m (6270 kHz), 43.73m (6860 kHz), 31.98 m (9380 kHz). I.  
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

## Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.  
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.  
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105kHz). I.P.  
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.  
21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.  
22.00-22.15 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

**RADIO VARSOVIO**, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 05.30 ĝis la 06.00 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 16.30 ĝis la 17.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49m, 41m; 2) dum la svedlingva programo ĉiun duan mardon de la 16.00 ĝis la 16.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; de la 19.30 ĝis la 20.00 per ondoj 49m, 41m; de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m; 3) dum la danlingva programo sabate de la 14.30 ĝis la 15.00 kaj de la 19.30 ĝis la 20.00, dimanĉe de la 15.30 ĝis la 16.00 per ondoj 200m, 75m, 49m, 41m.

## ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Muritiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.  
b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano (196m, 48.47m, 41.38m, 31.10m), Vieno, Zagrebo, Ibra Radio.  
c) Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj).  
ĉ) Stacioj aŭdeblaj en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (31.28m, 25.60m, 25.27m, 19.60m), Vatikano (31.17m, 25.63m, 19.84m).



CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO  
PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

# adresŝanĝo

de Jonathan POOL kaj Richard E. WOOD

La redaktoro de la fakrevuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado* (antaŭe *La monda lingvo-problemo*), prof. Richard E. Wood, ŝanĝos sian adreson je la 1-a de aŭgusto 1977, al:

Department of English  
University of Puerto Rico  
Río Piedras, Puerto Rico 00931, Usono.

La aganta direktoro de CED, prof. Jonathan Pool, ŝanĝos sian adreson je la 1-a de septembro 1977, al:


Department of Political Science, D0-30  
University of Washington  
Seattle, Washington 98195, Usono  
(telefono: 206-543-7946).

La oficiala adreso de CED restos ĉe la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Sukceson en Esperanto-  
instruado certigas




internacia lerneja esperanto-revuo  
jarabono (3 n-roj) ĉe UEA: 5,70 gld.



## Facila kaj utila helpo

Pro sia profesia okupiteco, multaj homoj, spite al siaj deziroj, ne sukcesas aktivi en la Movado. Ili tamen estas membroj kaj regule pagas siajn kotizojn al diversaj organizaĵoj. Nu, ankaŭ

tio estas grava helpo al la Movado. Vi eble ne havas tempon varbi novajn membrojn por UEA kaj TEJO, sed vi ja trovos tempon simple disdoni la du belajn informilojn! Mendu ilin ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.



REGO LEAR estas majstra traduko de majstroverko en prestiĝa eldonserio de UEA. 160p. 21cm. Broŝurita 9,—, bindita 12,— gld. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe vialanda libroservo.

## Ĉu vi havas ion por diskonigi al ĉiuj en la Movado?

La plej simpla kaj — konsiderante ĉion — la plej malmultekosta maniero atingi tion estas anonci en nia revuo. Memoru, ke la revuon legas minimume 13 000 homoj en 86 landoj tra la tuta mondo. Vidu nian anonctarifon sur la dua kovrila paĝo.



CENTRO  
DE ESPERANTO  
KAJ DOKUMENTADO  
PRI LA MONDA  
LINGVO-PROBLEMO

## esperanto en perspektivo


FAKTOJ  
KAJ ANALIZOJ  
PRI LA INTERNACIA  
LINGVO

LONDON  
ROTTERDAM  
1974



La unua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas jam de jardekoj elĉerpita, la dua eldono de "Enciklopedio de Esperanto" estas nun prilaborata, sed oni atendas ĝian aperigon ankoraŭ plurajn jarojn. Feliĉe, ekzistas **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**, kiu estas la movada

# enciklopedio de la nuna tempo



Fakuloj epitetaj ĝin jene: monumenta enciklopedia verkego (Waringhien), epopeo (Pool), giganta trezoro (Blanke), senprecedenca entreprenado (Régulo), kvazaŭ streĉa romano (Wells).

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

## fariĝu domposedanto

Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: s-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.

## ★ HAVEBLA BELA FLAGO ESPERANTA

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO, HAGO

Ĝis nun oni kutime proponis nur flagetojn. Nun, finfine, estas mendebaj ankaŭ belaj grandaj flagoj, en la grandeco 100x150cm, el centprocenta kotono, kun koloroj, kiuj permesas normalan lavadon. Mendu ĉe: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstr. 172, Den Haag, Nederlando. Prezo: 45,00 gld.

## AL VI DE MI



ALBERTA CASEY, el La Jolla, Kalifornio, ĵus produktis sian unuan gramofondiskon kun dek sep Esperantaj kantoj. Kvankam temas pri bone konataj, popularaj melodioj de diversnaciaj komponistoj kaj teksto-tradukintoj, la disko estas pli ol kutime rezulto de unuopa sindediĉo, ĉar: Alberta ne nur kantas, sed ŝi ankaŭ desegnis la kovrilon, ornamis ĝin per fotografajo de la busto de d-ro Zamenhof, kiun ŝi mem skulptis, kaj — fine — la disko aperas kiel propra eldonaĵo de la artistino. La disko estas grandformata, stereofona. Pian-akompano de Edith Gordon. Prezo: Us. dol. 5,95. Mendu ĉe la aŭtorino: P.O.Box 626, La Jolla, CA 92038, Usono, aŭ ĉe la Libroservo de ELNA, Box 429, El Cerrito, CA 94530.